

juna amiko

Majo 2024 • n-ro 2/2024 (179)



**PROGRESIGA REVUO
POR LEGANTOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ**

△ Monda Socia forumo 2024 en Nepalo.
Konversaciaj temoj; Telefonaj interparoloj. *Erasmus+*:
La ponto de espero kun Esperanto-laborlingvo. *Kantu kun
Juna Amiko*: Danke al ĝi. *LUDE*: Kuraĝo ĉion atingas.
Legu kaj ĝuu. *Interkultura Mondo*: Drakoj alportos bonŝancon.
Esperantujo: Esperanto-Postkruciĝo. *Laste*: La aĝo de vario.



PILĈJO

Aŭtoro: Héctor Quintero Desegnis: Sonmy
Tradukisto: José de Jesus Campos Pacheco



(Daŭrigo sur la paĝo 40.)

Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Ahmad Reza Mamduhi, IR) 4

Konversaciaj temoj:

Familiaj interparoloj (Judith Felszeghy, HU) 5



Ideo: Kiom stultan ideon mi havis... (Mireille Grosjean, CH) 9

Erasmus+: La ponto de espero – Erasmus en Italio, kun Esperanto-laborlingvo 3 (Małgosia Komarnicka, PL) 10



Kantu kun Juna Amiko: Danke al ĝi (Małgosia Komarnicka, PL kaj Luiza Carol, IL) 12


Legu: Legu kaj ordigu! (Mireille Grosjean, CH) 14



LUME: El mia kolo-ra vivo (Pavel Rak, CZ) 16



LUDE: Kuraĝo ĉion atingas (Mónika Molnár, CH) 17



Teatraĵeto: Verda Cirko (José de Jesús Campos Pacheco, CU, Luiza Carol, IL kaj Odelvis del Sol, CU) 19

Ekspozicio Verda Cirko (Julian Rogelio Alvarez Lopez kaj José de j. Campos Pacheco, CU) 21



Legu librojn – premioj – konkursoj: Vizitu bibliotekon... Klubo de bona libro. Rekomendo. Lando de drako kaj ĝiaj flago kaj blazono. Butano. Butanaj legendoj (Małgosia Komarnicka, PL; Helga Plötner, DE) 22

Vizito en Vroclava Urbo-

domo (Joasia Kwiatkowska kaj Małgosia Komarnicka, PL) 27



Feliĉaj, kreivaj kaj aktivaj pliaĝuloj (Waldek Bielecki, PL) 28



Tra la mondo: Monda Socia Forumo 2024: alia mondo eblas (Prakash Khadka, NP) 35

Interkultura Mondo:

Drakoj alportos bonŝancon. Drakoj invitas teumi... (Elena Nadikova, RU; Lisha LIN/ Lisa TEA, CN) 35

Krucenigmo: (Stano Marček, SK) 36

Esperantujo: Esperanto-Poŝtkrucigo.

Infana semajno en Greziljono 37

LASTE: La aĝo de vario (Stefan Mac Gill, NZ/HU) 38

Landaj Reprezentantoj – Perantoj de Juna Amiko ... 39

Eldonanto de Juna amiko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). **Jura sidejo:** Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejoj:** Ĉefaj informoj pri Juna Amiko: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 173 (1972 ĝis 2022) publike legeblas ĉe: www.eventoj.hu/juna-amiko/. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net.

Redaktoro: Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Rob Moerbeek (Nederlando) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo), José de Jesús Campos (Kubo), Raita Pyhälä (Finnlando). Presita en Slovakio. **Administranto:** Hamzeh Shafiee, ilei.oficejo@gmail.com. La sekva numero aperos en Septembro 2024. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de Januaro, Aprilo, Aŭgusto kaj Oktobro. **Jarabono** € 18 en t. n. A-lando kaj € 13 en B-lando, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekz. al la sama adreso). Reta varianto: A-lande € 11, B-lande € 7.

ISSN 0230 1318

Karaj amikoj!

Estas Majo, tiel nomata Monato de Amo. Bonvolu kun amo legi tiun ĉi numeron de *Juna Amiko*. Vi trovos en ĝi interesajn telefonajn interparolojn en *Konversaciaj temoj*, gajajn “*Stultajn ideojn*” de nia Mirejo, la amplanan trian parton de “La ponto de espero Erasmus+ kun Esperanto-laborlingvo”, kaj kanton “Danke al ĝi”, en kiu “en nia koro Esperanto venkis”. Kun amo ni povas nutri birdojn en *Legu kaj ordigu*, fiŝojn en la rubriko *LUDE*, aŭ kolorigi ŝipon kaj naturon en la rubriko *LUME*. Eblos ankaŭ lanĉi kajtojn en la teatraĵeto *Verda Cirko 3*, ĉeesti tre belan ekspozicion kaj kunkanti en galerio kun la belegaj desegnaĵoj de infanoj kaj artistoj el Kubo. En la rubriko *Legu kaj ĵuu* ni vizitos Ŝtatan Bibliotekon kaj Arkivon de Esperanto en la itala urbo

Karaj legantoj,

Vere estas tre fascina fakto, ke iam preskaŭ tute la sama koncepto ekzistas ĉe tre diverskulturaj homoj en disaj foraj kontinentoj – eĉ kiam temas pri mita kaj nereala afero, kiel ... drakoj! Kaj eble pli interesa ol tio, estas tute diversaj kaj eĉ kontraŭaj ecoj, kiujn malsamaj kulturoj atribuas al ili!

Omaĝe al la ĉina novjaro, la jaro de drako – kiun mi elkore regratulas – en la rubriko Interkultura Mondo de tiu ĉi numero (ekde la paĝo 31), ni komprenas, ke drakoj ĉe orientanoj povas esti tute afablaj, saĝaj kaj helpemaj. Dum ilia ofta bildo ĉe multaj okcidentanoj montras malicajn monstrojn, kiujn heroo devas neniiĝi por helpi aŭ savi belulinon, kun kiu li finfine geedziĝos.

Probable la ĝenerala ĉeesto de la drakoj en mitologio de ege diverslokaj homoj,

Massa, Toskanio, kun Esperantaj libroj, gazetoj, fotoj, korespondaĵoj kaj diversaj dokumentoj. En “Klubo de bona libro” ni konatiĝos kun la libro “Mia pentrista vivo por Esperanto kaj por paco” de la pentroartistino Helga Plötnner, kun ŝia granda amo al homoj kaj al Esperanto, kun ŝia ateliero, kie troviĝas belegaj bildoj pri homoj, bestoj, floroj, konstruaĵoj, pejzaĝoj... Ni ekkonos la landon de drako, ĝiajn flagon kaj blazonon – la Reĝlandon Butano en Himalajo, ĝiajn arkitekturon, festivalojn, templojn, palacojn, statuojn kaj legendojn. Ni vizitos urbodomon en Vroclavo, kie renkontiĝis membroj de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado kaj feliĉaj kaj kreivaj plaĝuloj en la Esperanto-Klubo Góra – kaj vizitos Mondan Socian Forumon 2024. Atendas vin ankaŭ pliaj renkontiĝoj kun drakoj!


Agrablan legadon deziras al vi
via redaktoro **Stano Marček**

pruvas tion, ke kie ajn sur la tero, la homoj havas la samajn plaĉojn kaj timojn, kaj sekvantajn pripensaĵojn kaj elpensaĵojn. Tion apogas i.a. verkoj kiel tiu de juna brita sciencjurnalisto kaj verkistino Angela Saini (1980-), titolita “Supera (Raso): La Reveno de Rasa Scienco”. La libro publikiĝis en 2019 kaj estis rekonita kiel unu el la plej bonaj 10 libroj en tiu jaro fare de la scienca anglalingva revuo *Nature* (elparolu *nejĉer*, Naturo). Tiuverke ŝi simplalingve rivelas la fakton, ke ne ekzistas diversaj rasoj de homoj, sed ĉiuj ni estas nur *Homo Sapiens* (Homo Saĝa/Pensiva).

Do, danke al tiaj sciencaj eltrovoj espereble la mondo baldaŭ ĝuos trankvilan etoson for de ĉiaspeca rasismo kaj ĝiaj neeviteblaj fikonsekvencoj.

Bonan mondskalan drakumadon kaj brakumadon!

Ahmad Reza Mamduhi
Prezidanto de ILEI



Telefonaj interparoloj

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

Antaŭ kelkaj tagoj misfunkciis mia telefono. Kiam mi volis babili telefone kun mia amikino, ĝi ligis min al interparoloj de nekonataj homoj. Mi volis interrompi aŭ alparoli ilin, sed mia voĉo ne estis aŭdebla. Mi fidele kopiis la dialogojn kaj sendis la tekston al Juna Amiko. Por distingi la diversajn voĉojn, mi aldonis nomojn.

1. Du viraj voĉoj, Paŭlo (P) kaj Karlo (K).

- P – Jes, diru!
- K – Ha-lo, Paŭlo, ĉu estas vi?
- P – Certe mi! Kiu alia? Diru jam!
- K – Ĉu vi scias, kio okazis? Mi tute ne povis imagi, ke io tia povus okazi al mi! Ĉu ne?
- P – Ĉu vi volas tion rakonti pli mallonge, aŭ ne?
- K – Ĉu vi eble urĝas nun, aŭ vi ne havas tempon, aŭ...
- P – Ne, ne! Volonte mi aŭskultos vin, amiko, ĉefe se vi jam komencas, kion vi volis komuniki al mi!
- K – Bone. Do, eble vi scias, ke mi tute ne kutimas okupiĝi pri hazardludoj, nek pri loterio kaj tiaĵoj. Neniam mi volis gajni

monon sen laboro. Mi havas kolegon ekzemple, kiu ne povas kontraŭstari al ludmaŝinoj en la kafejo, kaj perdas tie la duonon de sia salajro. Mi jam plurfoje avertis lin, ke...

P – Karlo, ĉu vi ne estas nun rakontonta al mi, kio okazis al vi?

K – Jes, certe, ĝuste tion mi faras. Do, vi konas min, ke mi tute malŝatas tiaĵojn. Kaj tamen, rigardanta Fejsbukan iun vesperon, mi vidis interesan alvokon. Se iu respondas senerare demandojn pri futbalo, kaj futbalistoj, tiu povas senpage partopreni loterion. Mi eĉ ne kontrolis, kion ricevos tiuj. Min simple allogis, ĉu mi povos respondi la demandojn. Ĉiuj miaj respondoj montriĝis seneraraj! Tamen, ne ĉiuj

estis facilaj, kaj foje mi nur divenis la ĝustan. Do, mi estis kontenta pri mi mem, kaj iris dormi. Hodiaŭ alportis la poŝtisto registritan leteron, de la Landa Hazardluda Agentejo. Imagu mian surprizon! Mi pensis, eble temas pri eraro, kaj la ricevonto devus esti iu alia.

P – Ĉu vi tamen malfermis la leteron? Kio estis en ĝi? Ĉu oni sendis monon al vi?

K – Jes, ĉar vekigis en mi la scivolemo, kial oni sendas al mi registritan leteron.

P – De kie oni sciis vian poŝtan adreson?

K – Fininte la teston, mi aldonis ankaŭ mian adreson, telefonnumeron. Mia edzino tute kontraŭas



tion, dirante, ke oni neniam komuniku siajn personajn datumojn, adresojn, ktp, ĉar...

P – Rakontu jam fine, kio estis en la letero!

K – Do, oni skribis al mi! Ne estis eraro. La letero menciis, ke mi sukcese partoprenis en la ludo, povis respondi la demandojn senerare. Ili gratulis, kaj sendis du biletojn al la Eŭropa Futbal-Ĉampionado, al Germanujo! Imagination! Mi ne kuraĝis eĉ reŝi pri tio!

P – Vere granda surprizo estas tio! Mi gratulas vin! Sed kiel vi atingos Germanujon? Kaj kie vi tie tranoktos? Ankaŭ tio kostas ne malmulte.

K – Mi ankoraŭ ne finrakontis. En la letero troviĝis du kuponoj, laŭ la apuda letero de ili mi ricevos biletojn por aviadilo kaj tranoktejon en hotelo. Nekredeble, ĉu?

P – Vi diras „biletojn”, ĉu tio signifas, ke por du personoj?

K – Ĝuste! Morgaŭ mi nepre vizitos la menciitan vojaĝoficejon por interesiĝi pri la detaloj. Blanka, mia edzino, certe estos tre feliĉa. Do, mi ne plu okupos vin, mi volis nur rapide sciigi al vi tiun novaĵon.

P – Ĝis poste, amiko!

K – Ĝis, kaj salutu Florian ankaŭ nome de mi!

2. Unu pli aĝa, Elza (E) kaj unu pli juna Flora (F), virinaj voĉoj.

E – Ha-lo, jen mi!

F – Panjo, saluton! Parolas Flora.

E – Floreto mia, mi apenaŭ rekonis vian voĉon! Kio pri vi?

F – Nenio speciala, Panjo. Kiel vi ambaŭ fartas?



E – Sufiĉe bone, dankon! Via patro nun plenumas sian posttagmezan dormadon. Kiam ni povos vidi vin?

F – Verŝajne jam morgaŭ. Se vi estos hejme, mi alsaltos al vi posttagmeze por spekti la 123an daŭrigon de tiu romantika televida serio. La hodiaŭan mi ne sukcesis vidi, mi ege scivolas, kio okazos al Andreo, ĉu tiu virino forlasos lin, aŭ ne.

E – Ankoraŭ nenio estas certa. Sed laŭ mi, ŝi ne forlasos lin. Kial vi ne spektis la hodiaŭan parton?

F – Nia malnova televidilo mortis. Kiam mi ŝaltis ĝin, aperis iom da lumo, sed poste la ekrano malheliĝis, kaj ankaŭ voĉo mankis.

E – Ĉu vi kontrolis, ĉu ĝi ricevis elektran kurenton?

F – Jes, certe. Kaj mi ankoraŭ kelkfoje enŝaltis kaj malŝaltis ĝin, sed ĝi restis nigra kaj muta.

E – Vidu, ĝi estis jam vere tre malnova aparato. Do, filineto mia, venu morgaŭ por spekti la filmon. Ĉu vi venos kun Paŭlo?

F – Ne. Lin tute ne interesas tiaj serioj. Futbal-matĉojn li kutime spektas ĉe sia amiko. Sed eĉ tiel li ne ĝojos, kiam mi diros al li tion. Ĝis morgaŭ, Panjo! Mi tuj telefonvokos Paŭlon.

3. Jam la konataj voĉoj de Flora (F) kaj Paŭlo (P).

P – Ha-lo, Flora! Mi ankoraŭ laboros, mi diris al vi, ke hodiaŭ kaj morgaŭ mi restos pli longe en la uzino. Kio okazis?

F – Mi ne scias, kio povis okazi al la televidilo.

P – Kial?



F – Ĉar estas nek bildo nek voĉo. Mi ŝaltis kaj malŝaltis ĝin kelkfoje, kontrolis la elektran kurenton, la dratojn, ĉion.

P – Ho, ve, terure! Cetere, tio estis jam atendata, ke la televidilo paneos. Hm... Bedaŭrinde nun mi nenion povas fari. Mi estos hejme nur malfrue. Karulino mia, provu trovi iun teknikiston, kiu konas ankaŭ la tre malnovajn televidilojn. Interesiĝu ĉe viaj geamikoj, gepatroj, eble iu havas ideon. Ĉu bone?

F – Kion fari... Mi provos.

P – Estu lerta! Nun mi devas labori. Kisojn, dolĉulino!

F – Kisojn! Ĝis!

4. La konata voĉo de Flora (F) kaj nova virina voĉo, Blanka (B).

F – Saluton, Blanka, estas mi!

B – Ho, saluton Flora! Mi volis ĵus paroli kun vi! Kion vi faras? Ĉu vi ne estas okupata? Mi estas ironta butikumi, sed mi nepre volas babili kun vi! Ĉu vi ne emas akompani min?

F – Kion vi volas aĉeti?

B – Nur legomojn, panon, ion por vespermanĝo. Venu, ni iru al la proksima ĉiovendejo. Tie la prezoj estas sufiĉe malaltaj. Dume ni babilos, mi havas novaĵon!

F – Fakte, mi volis demandi ion de vi. Ĉu vi ne konas iun teknikiston kiu konas malnovajn televidilojn? La nia ĵus paneis.

B – Bedaŭrinde ne. La nian ni jam forĵetis antaŭ 20 jarojn, la nuna estas jam la dua aparato ekde tiam. Sed vespere mi demandos al Karlo, eble li konas iun,



kiu povas helpi vian televidilon. Do, ĉu vi venos?

F – Jes, mi venos. Ankaŭ mi bezonas manĝaĵojn. Atendu min ĉe la angulo!

B – Konsentite! Brakumon!

5. La postan tagon. Elza (E) kaj Flora (F), la pli maljuna kaj la pli juna virinaj voĉoj. Post kelkaj minutoj unu vira voĉo, Henriko (H) aldoniĝis.

F – Panjo, saluton!

E – Bonan matenon, filineto! Kiam vi venos? Mi preparos bongustan tagmanĝon.

F – Mi ne povos veni, bedaŭrinde.

E – Kial, kio okazis?

F – Ĝuste tio, ke okazis nenio. Hieraŭ vespere Paŭlo sendis ĉi tien iun konatulon sian, kiu rigardis la televidilon, kaj tiu diris, ke eblas nenion plu fari pri ĝi. Mi nun atendas iun alian teknikiston, kiun proponis la hieraŭa teknikisto. Tial mi ne povas iri al vi.

E – Tion mi multe bedaŭras!

F – Ankaŭ mi bedaŭras! Imagu, Panjo, nia amiko gajnis dupersonan partoprenon en la Eŭropa Futbal-Ĉampionado, en Germanujo, kune kun vojaĝkosto kaj tranokto. Kutime ni kune spektas ĉe ili la sportajn konkursojn. La edzinon ne aparte interesas sportaj konkursoj, sed certe estas interese vojaĝi eksterlanden. Hieraŭ la edzino, mia amikino, demandis min, ĉu ŝi eble retirigu de la vojaĝo, kaj anstataŭ ŝi, iru Paŭlo al Germanujo.

E – Ho, ŝi estas ja vere bonkora! Sed kion vi respondis? En tiu kazo mi gastigos vin ambaŭ dum la foresto de la edzoj.

F – Mi ne scias. Mi rimarkis, ke ŝi, mia amikino, tamen volonte veturus al Germanujo.

- E – Atendu filineto, via patro mansignas, ke ankaŭ li volas paroli kun vi.
- H – Saluton Florinjo! Mi aŭdis de Panjo, kio okazis. Ĉu vi scias, mi havas malnovan kaj maljunan kamaradon, kiu siatempe ĉion sciis pri televidiloj kaj radioaparatoj. Mi rakontis al li, kio okazis, kaj li konsentis rigardi kaj eble kuraci vian pra-televidilon, he-he.
- F – Ho, Paĉjo, ege bone! Tiu pra-televidilo estas malnova Grundig, kaj la teknikisto diris, ke mortis transistoro en ĝi, verŝajne... atendu... mi skribis la nomon: BC107.
- H – Lerte vi faris tion, filineto! Mi do veturigis lin al vi... hm... post 1 – 2 horoj. Ĉu bone tiel?
- F – Vi estas ja mirinda patro! Mi preparos por vi ambaŭ kafon, kaj aĉetos kukon! Ĝis poste, kisetojn!
- H – Kisetojn, filineto!

6. La trian tagon. Du virinaj voĉoj, Flora (F) kaj Blanka (B).

- F – Ha-lo, Blanka, estas mi!
- B – Saluton Flora!
- F – Kara amikino, preparu vian valizon por la veturado al Germanujo! Paŭlo restos hejme, kaj vi ĝuu la vojaĝon! Hieraŭ vespere mia patro alveturigis al ni sian malnovan kamaradon, kiu sciis ĉion pri la malnovaj televidiloj. Li ŝanĝis la transistoron, kaj la televidilo resaniĝis. Poste ni kafumis, manĝis kukon, babilis pri malnovaj tempoj, estis tre agrabla vespero. Paŭlo venis nur malfrue hejmen, li havas nun kromlaboron. Li lace falis en la liton, ankoraŭ eĉ ne sciis, ke la televidilo jam funkcias.
- B – Ho, bonege! Mi jam preparis por mi planojn, kion mi faru dum tiuj tagoj hejme. Sed mi vere ĝojas, ĉar mi tre volonte veturos kun Karlo al German-

- ujo. Mi neniam ankoraŭ vizitis ĝin.
- F – Mi volis nun inviti vin, por kune butikumi. Mi volas prepari bongustan vespermanĝon. Ĉu ni renkontiĝu nun ĉe la angulo?
- B – Bona ideo! Mi estas jam venonta. Ĝis!
- F – Ĝis!

7. Du virinaj voĉoj, ili estas de Elza (E) kaj Flora (F).

- E – Ha-lo, Flora! Paĉjo rakontis fiere, ke ili povis rebonigi vian televidilon! Gratulojn!
- F – Jes Panjo, mi ege ĝojis. Sed, imagu, kio okazis!
- E – Ho, ĉu iu plia problemo?
- F – Ne, sed aŭskultu! Paŭlo alvenis jam antaŭ unu horo, kun nova t-e-l-e-v-i-d-i-o! Do, ni havas nun du! Tiu, kiun li aĉetis hieraŭ, estas kun grandega ekrano, kaj ĝi estas tiaspeca inteligenta, kun multaj programoj kaj ebloj! Do, ni spektos per ĝi la Eŭropan Futbal-Ĉampionadon!
- E – Ho, nekredeble! Sed ĉu Paŭlo ne sciis jam, ke la televidilo denove funkcias?
- F – Ne! Mi ne diris tion al li hieraŭ vespere. Li estis tiom laca, li apenaŭ salutis min, kaj iris dormi. Nun li ludas per la nova televidilo, rigardas, kiujn eblojn ĝi havas...



Abrupte aŭdeblis krako, kaj reaperis la konata voĉo de MIA amikino. Ŝi plendis, ke mi jam plurfoje vokis ŝin, kaj kiam ŝi volis respondi, aŭdeblis nenio. Mi pardonpetis, kaj diris nenion plian.

Vortklarigoj:

Agentejo: loko, kiu agas nome de iu persono aŭ societo.

Elektra kurento: fluo de elektro en la sama direkto.

Ĉampionado: sport-konkurso.

Futbalo: populara pilko-ludo, inter du dek-unu-personaj grupetoj.

Matĉo: sportludo inter du homoj aŭ du grupoj de homoj.

Transistoro: grava elektronika malgranda parto.

Krako: brueto.

Taskoj:

(Komencu plenigi la taskojn post du-, tri-foja tralegado de la dialogoj, kaj perfekta kompreno de la vortoj!)

1. Prezentu (diru, aŭ skribu) vian opinion pri la hazardludoj! Ĉu vi ŝatas, partoprenas en tiaj ludoj? En kiuj? Ĉu vi iam jam gajnis (malgajnis), kaj kiom? Ĉu vi trovas tion amuza, morale akceptebla?
2. Ne funkcias via komputilo (tekkomputilo, radioaparato), parolu (telefone aŭ persone) kun teknikisto. Diru, ke vi urĝe bezonas vian komputilon. La teknikisto havas multe da laboro, kaj povas akcepti la laboron nur por 10 – 15 tagoj. Konvinku lin (ŝin) en dialogo!
3. Prezentu dialogon kun via kunlernanto (aŭ skribu): malfunkcias via televidilo, sed ĉi-vespere estos la fina parto de la ŝatata televida serio. Vi estas scivola pri ĝi, kaj petas vian amikinson (najbaron, ktp), ke vi povu spekti ĝin per lia (ŝia) aparato. La problemo estas, ke via amikino (najbarino) havas alian programon ĉi-vespere.

Mireille Grosjean

Kiom stultan ideon mi havis...



Nepre legu informojn sur la botelo kaj komprenu ilin!

Kie mi antaŭe loĝis, en vilaĝo Les Brenets, mi havis gastoĉambron kaj la gasto havis nur por si mem duŝambreton.

Tiun ĉambreton mi neniam uzis por mi mem, ĉar mi havis banĉambron aliloke. Mi gastis personon el Japanio. Post la foriro de tiu persono mi iris al la duŝambreto por purigi ĝin, kaj trovis boteleton, ĉu forgesitan, ĉu simple lasitan, mi ne scias. Mi prenis ĝin kaj rigardis. Mi vidis tekston en la japana, do mi ne povis kompreni. Ion mi komprenis: protektfaktoro 50. Do mi deduktis, ke temas pri kremo, kiu protektas kontraŭ la sunradioj. Irante al Benino, mi kunportis tiun boteleton, ĉar mi bezonas protekti miajn brakojn kontraŭ la suno. La supera parto de miaj brakoj estas protektita de miaj vestaĵoj, sed ne la parto inter kubuto kaj manartiko. Do tiun parton mi bezonas ŝmiri per protekta kremo. Tion mi faris dum kelkaj tagoj, uzante la enhavon de tiu japandevena boteleto.

Post semajno mi subite konstatis strangajn kolorojn ĉe miaj brakoj: la supera parto kaŝita sub vestaĵoj estis pli malhela, ol la alia parto inter kubuto kaj manartiko... Mi komprenis, ke tiu kremo estas fakte blankiga kremo! Pri tio mi ne povis scii. Mi ne havas intencon fariĝi pli blanka ol mi jam estas. Por Japanoj la blanka koloro de la haŭto estas la pinto de beleco. Japanoj protektas sin kontraŭ sunradioj, surhavante ĉapelon kaj vizieron. Artistoj kiel geĵoj, profesiaj elegantulinoj, kutimas uzi ŝminkaĵon por blankigi sin. Japanoj kutimas aserti: ni estas blankuloj, Eŭropanoj estas rozkoloruloj.

La ponto de espero – Erasmus+ en Italio, kun Esperanto-laborlingvo

Daŭrigante la prezenton de nia projekto (la tria parto), kiu estis realigata kadre de la eŭropa programo Erasmus+, mi ĉi-foje priskribos niajn ekskursojn. Eble tiu priskribo helpas al vi plani partoprenon en 90-a Itala Kongreso, kiu ĉi-jare, Aŭguste, okazos en Montecatini Terme, kaj viziti belegan Toskanion.

En la du unuaj partoj mi priskribis kiumaniere komenci kaj realigi la programon, nian belan ĉiutagan vivon kaj kion nia grupo ellernis (vidu JA 4/2023 kaj JA 1/2024).

Kunlaborante kun Itala Esperanto-Instituto kadre de la eŭropa programo Erasmus+ ni havis la eblecon ekkoni la



Post la vizito en Konsulejo RP.

kulturon kaj multajn mirindajn, historiajn lokojn de Italio, kiujn ni ĝis nun konis de literaturo. La organizitaj ekskursoj permesis al ni pli bone ekkoni la belecon de Italio, sed antaŭ ĉio ili estis bonegaj konversaciaj lecionoj.

Unue ni vizitis la urbon Tirrenia, kie ni loĝis. Ni filmis sunsubirojn kaj ripozis sur la plaĝo... Poste ni admiris unu el la plej ofte vizitataj urboj en Italio, belan Pizo-n – ni savis la Oblikvan Turon...

Granda okazo por alfronti niajn librajn sciojn kun la realo estis vizito en Florencon. Ĝi ankaŭ estis neatendita liberigo de impresoj kaj emocioj, ĉiufoje kiam ni revenis al ĉi tiu urbo.

Serĉante la spiriton de la genia Leonardo, ni iris al Vinci, pitoreska urbo inter olivarboj kaj vinberejoj.

Ni ankaŭ spertis timindan vojaĝon laŭ mallarĝaj kaj serpentumaj vojetoj al Grotta del Vento, sed la restado en la groto kaj renkonto de ĝia posedanto kompensis ĉion.

La urbo Barga kun siaj serpentumaj stratoj, rustkoloraj tegmentoj kaj pitoreskaj konstruaĵoj faris al ni neforgeseblan impreson.

Ni promenis ĉirkaŭ unu el la plej originalaj konstruaĵoj en la tuta Toskanio, kiu troviĝas en Borgo a Mozzano – tio estas la Ponto del diavolo.

Ni eĉ sukcesis viziti la perlon de Ligurio en la regiono Cinque Terre, la fabelurbon Portovenere, kie la tempo haltis.

Ni velis per ŝipo admirante la Golfon de Poetoj.

Ni ankaŭ vizitis la belan pramurbon La Spezia, promenante laŭ la aleo de palmarboj laŭ la maro.

Ni ankaŭ tre ŝatis Massa-n kun ĝiaj mirindaj Esperanto-Biblioteko kaj Arkivo. Ni admiris la plej grandan havenurbon

en Toskanio, situantan proksime de nia loĝloko, belan Livorno-n kaj la faman Sanktejon, dediĉitan al la Madonna delle Grazie en Montenero.

Vespere ni promenis kaj admiris la fenomenan urbeton Areco kaj en suna tago ni admiris la monumentojn de Sieno, kiuj estas perloj de itala arkitekturo.

Ni vizitis ankaŭ Lukon, ĉarman urbon kun unika etoso, dum la plej grandaj kaj gravaj internaciaj foiroj por ludoj, komiksoj, mangaoj*... Ni observis esperantistojn ĉe la Esperanto-stando kaj akiris plian sperton pri kiel ĝuste prepari kaj uzi reklamadon. Tie okazis ankaŭ mirindaj konversacioj...

Ni iom seniluziiĝis pro nia vizito al vilaĝeto Collodi, ĉar ni imagis, ke ni vidos Pinokjon ĉirkaŭ ĉiu angulo (la verkisto Lorenzini uzis Collodi pseŭdonime)...

Lastan ekskurson ni organizis al la "Muzeo Piaggio" en Pontedera por admiri "Vespojn" (tipe Italaj skoteroj), eksponaĵojn en la plej granda muzeo de motorcikloj en Italio kaj unu el la plej granda en Eŭropo.

Tiujn momentojn oni ne forgesas, same kiel oni ne forgesas la amikojn, kiuj akompanis nin dum tiuj ĉi vojaĝoj aŭ organizis ilin por ni. Ni havis feliĉon realigi la projekton kun homoj plenaj de pasio, kun kiuj ni konstruis partnerecon, interŝanĝis sciojn, ideojn kaj antaŭ ĉio ni promociis internacian kunlaboron... Ni dankas al la konsulo de la Respubliko de Pollando, Stefano Barlacchi kaj Marco Cecchi, Aleksandra Seghi, Bruĉjo Casini, Brunella Moracci, Enrico Gaetano Borrello, Carlo Nicola Colacino.

Ni estas feliĉaj, ke ni havis la eblecon partopreni en eŭropa projekto dank' al kiu ni pliriĉigis nian scion partoprenante en preparitaj laborsesioj, sed ankaŭ ni lernis ĝui gustojn, muzikon, vidaĵojn kaj malgrandajn ĉiutagajn plezurojn. Ĉi tiun nian novan, belan ĉiutagan vivon ni efektivigis en Italio dank' al la projekto financita de Eŭropa Unio kaj dank' al kunlaboro kun Itala Esperanto-Instituto - Instituto Italiano di Esperanto kaj, ĉefe,

*) Mangao: ludo de anĝeloj kaj demonoj.



En la granda havenurbo Livorno.

kun la reprezentantoj de la instituto, Laura Brazzabeni kaj Bruĉjo Casini.

Ni kuraĝigas vin partopreni en Erasmus+-programoj kaj konstrui internacian kunlaboron, planan de respekto kaj reciproka kompreno, ĉar en diverseco estas beleco...

Małgosia Komarnicka

(Kuniciatintino kaj gvidantino de la projekto Erasmus+)



En la pitoreska urbo Vinci.



La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka

malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti – kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugestite alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin pri fremda lingvo. La laboro kun kanto sentigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Baldaŭ estos Julio kaj ni festos 137-an datrevenon de Esperanto. Mi proponas, ke ni ĉiuj, sendepende kie ni estos dum tiu tago, kantu belegan kanton “Danke al ĝi”. La vortoj de la kanto plenigas per ĝojo kaj feliĉo korojn de aŭskultantoj kaj kantantoj. Certe nia komuna kantado donos energion al nia Movado (estus belege, se ni interkonsentus la saman horon)...

La vortojn kaj muziknotojn al ĉi tiu bela kanto skribis Luiza Carol, la israela esperantistino, poetino, verkistino, aŭtorino de multaj teatraĵoj kaj longdaŭra kunlaborantino de “Juna Amiko”.

Demando al Luiza: Kion elvokas en vi la vorto “Esperanto”, kiam vi ĝin aŭdas aŭ legas?

Luiza: La vorto “Esperanto” elvokas por mi la personecon de la iniciatinto de nia lingvo kaj de nia Movado. Ĝi igas min

pensi pri la utopia revo de Zamenhof: pli justa kaj pacema mondo.

Utopio signifas “Nenie”, sed ne signifas “Neniam”. Do, temas pri revo plenumbla. Dum 137 jaroj, la esperantistoj klopodis por efektiviĝi kiel eble plej helpeman kaj amikeman komunumon, eĉ dum teruraj historiaj kondiĉoj. La klopodoj kelkfoje fiaskis, tamen la eraroj espereble faris nin pli fortaj kaj pretaj venki ontajn malfacilaĵojn. La vorto “Esperanto” elvokas por mi la noblan ekzemplon de “realisma optimismo”, kiu donis al ni Ludoviko Zamenhof.

Pri Luiza Carol, el Vikipedio:

Luiza Carol [prononcu: lujza karol] naskiĝis la 1-an de Marto 1947 en Bukareŝto (Rumanio) kaj loĝas en Israelo ekde 1980. Ŝi estas verkistino.

Luiza Carol skribas por infanoj kaj/aŭ por plenkreskuloj: poemojn, prozaĵojn, teatraĵojn, kantojn, eseojn kaj tradukojn. Ŝi publikigis en la rumana (ekde 1969), en la angla (ekde 1981) kaj en Esperanto (ekde 2006). Ŝiaj verkoj estis tradukitaj en multajn lingvojn. Ŝi estis premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA. Novelo ŝia aperis en “Vizaĝoj” (2010). Ŝi kunlaboris en diversaj medioj, ekzemple en la gazetoj *Beletra Almanako*, *La Karavelo*, ktp. (El: https://eo.wikipedia.org/wiki/Luiza_Carol).



DANKE AL ĜI

Vortoj kaj melodio: Luiza CAROL

E Am E

en ni-a ko-ro Es-pe-ran-to ven-kis dan-ke al ĝi
en ni-a ko-ro mond-fra-te-co ven-kis

5 C+ Am E

dan-ke al ĝi ni ha-vas mul-tajn ge-a-mi-kojn ka-rajn
ne ve-ne-ni-gas mal-am-vi-von ni-an

9 Dm Am E

ni po-vas le-gi be-le-tra-ĵojn ra-vajn ni po-vas
ni ĉer-pas ĝoj-on el a-bun-daj fon-toj ni po-vas

13 C+ Am E Am

kan-ti ti-un no-van kan-ton dan-ke al ĝi dan-ke al ĝi
re-vi pri pli jus-ta mon-do

© Luiza CAROL 2021 ©

Danke al ĝi

En nia koro Esperanto venkis,
danke al ĝi
danke al ĝi
ni havas multajn geamikojn karajn,
ni povas legi beletraĵojn ravajn,
ni povas kanti tiun novan kanton
danke al ĝi
danke al ĝi
En nia koro mondfrateco venkis,
danke al ĝi
danke al ĝi

ne venenigas malam' vivon nian,
ni ĉerpas ĝojon el abundaj fontoj,
ni povas revii pri pli justa mondo
danke al ĝi
danke al ĝi

Kion ĉe vi, legantoj de Juna Amiko,
elvokas la vorto Esperanto?

Kantu kaj lernu!

Bonvolu sendi al mi proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de Juna Amiko havu la eblon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo: malgosia.junaamiko@gmail.com

Mireille Grosjean

Legu kaj ordigu!

Nutri birdojn en vintro

Jam vespere sidante en sia varma ĉambro li vidas tra la fenestro birdojn manĝantajn en la de li instalita dometo.

Do li eniras buson ĝis la urbocentro.

Li dormas serene pensante pri la birdoj, kies ventroj nun estas tute plena.

Li penas serene dormi pensante pri la tremantaj birdoj sur iu branĉo.

Karlo staras en varma ĉambro kaj rigardas eksteren al la de neĝo kovritaj arboj; li pensas pri la birdoj.

Post tia pripenso lia kompato al la birdoj kreskas.

Li iras al la fenestro kaj firme fiksas la dometon; ĝi ne falu en kazo de vento!

Neĝo amasiĝas, temperaturo falas, vintras.

Tute feliĉe li revenas hejmen.

Alveninte en sia hejmo li forprenas sian mantelon kaj siajn malsekajn ŝuojn kaj tuj ekpreparas la dometon.

Li prenas sian monujon kaj pagas la porbordan dometon.

“Kiel la birdoj sukcesas pluvivi en tia vetero? Ĉu ili sukcesas trovi ion por manĝi, kiam la neĝo kovras ĉion?”

Li metas la grajnoj en la dometon kaj ridetas pro feliĉo.

Tie li trovas vendejon, kiu montras en sia vitrino malgrandajn lignajn dometojn, en kiuj oni povas meti manĝaĵojn por la sovaĝaj birdoj.

Do li devas aĉeti grajnoj!

“Jen tio, kion mi volas aĉeti! Mi eniru tiun vendejon.”

Li pensas: “Tiu dometo estas malgranda, sed sufiĉas, ke mi metu nutraĵojn ofte, tiel ke la birdoj ĉiam trovu ion por manĝi!”

Prudente li paŝas kun plena taso en sia mano kaj iras al la fenestro.

Li penas elekti dometon, ĉar li ne bone memoras la dimension de sia fenestro.

Sur la tablo en la kuirejo li malfermas la sakon kaj metas grajnoj en tason.

Matene li decidas iri al la urbo por viziti vendejon kun espero trovi ion por helpi al la birdoj.

Li prenas sian monujon kaj pagas por sako da grajnoj.

En tiu parto de la bazaro li trovas grajnoj por sovaĝaj birdoj.

En la urbocentro li trovas grandan bazaron, kie estas parto kun ĝardenaj aferoj.

Finfine li elektas etan dometon, do tre malgrandan aferon.

Tiam venas al lia menso la ideo, ke li ne posedas grajnoj por nutri la birdojn.

Karlo eniras la vendejon kaj vidas plej diversajn dometojn por birdoj.



SOLVO:

Neĝo amasiĝas, temperaturo falas, vintras.

Karlo staras en varma ĉambro kaj rigardas eksteren al la de neĝo kovritaj arboj; li pensas pri la birdoj.

“Kiel la birdoj sukcesas pluvivi en tia vetero? Ĉu ili sukcesas trovi ion por manĝi, kiam la neĝo kovras ĉion?” Post tia pripenso lia kompato al la birdoj kreskas.

Li penas serene dormi pensante pri la tremantaj birdoj sur iu branĉo.

Matene li decidas iri al la urbo por viziti vendejon kun espero trovi ion por helpi al la birdoj.

Do li eniras buson ĝis la urbocentro.

Tie li trovas vendejon, kiu montras en sia vitrino malgrandajn lignajn dometojn, en kiuj oni povas meti manĝaĵojn por la sovaĝaj birdoj.

“Jen tio, kion mi volas aĉeti! Mi eniru tiun vendejon.”

Karlo eniras la vendejon kaj vidas plej diversajn dometojn por birdoj.

Li penas elekti dometon, ĉar li ne bone memoras la dimension de sia fenestro. Finfine li elektas etan dometon, do tre malgrandan aferon.

Li pensas: “Tiu dometo estas malgranda, sed sufiĉas, ke mi metu nutraĵojn ofte, tiel ke la birdoj ĉiam trovu ion por manĝi!”

Li prenas sian monujon kaj pagas la porbordan dometon.

Tiam venas al lia menso la ideo, ke li ne posedas grajnoj por nutri la birdojn.

Do li devas aĉeti grajnoj!

En la urbocentro li trovas grandan bazaron, kie estas parto kun ĝardenaj aĵoj.

En tiu parto de la bazaro li trovas grajnoj por sovaĝaj birdoj.

Li prenas sian monujon kaj pagas por sako da grajnoj.

Tute feliĉe li revenas hejmen.

Alveninte en sia hejmo li forprenas sian mantelon kaj siajn malsekajn ŝuojn kaj tuj ekpreparas la dometon.

Li iras al la fenestro kaj firme fiksas la dometon; ĝi ne falu en kazo de vento!

Sur la tablo en la kuirejo li malfermas la sakon kaj metas grajnoj en tason.


Prudente li paŝas kun plena taso en sia mano kaj iras al la fenestro.

Li metas la grajnoj en la dometon kaj ridetas pro feliĉo.

Jam vespere sidante en sia varma ĉambro li vidas tra la fenestro birdojn manĝantajn en la de li instalita dometo.


Li dormas serene pensante pri la birdoj, kies ventroj nun estas tute plenaj.

Mireille Grosjean




El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Kion vi vidas sur la bildoj?
Kiom da diferencoj en la du bildoj vi trovis?

Kuraĝo ĉion atingas



La rubrikon prizorgas: Mónica Molnár



En la lernejo aperis nova alvoko sur la anonc-tabulo. Ĉiuj gelernantoj kun granda intereso legis ĝin.

Temis pri konkurso kaj multaj ekiris hejmen tute ekscititaj. Ankaŭ la ulidoj ŝategis la anoncon kaj ili certegis, ke Kreemulido tuj partoprenos ĝin.

Kiam ili volis demandi lin pri liaj intencoj... ili trovis Kreemulidon tute trista kaj ili ne komprenis, kio okazis al ilia amiko. Li devus esti entuziasmega!

– Jes, jes, mi legis la alvokon kaj unue mi tre ĝojis – diris Kreemulido –, sed poste mi ektimis... Ne, la problemo ne estas tio, ke mi ne havas ideon, sed ĝuste tio, ke mi havas trooo da ideoj.

– Venu, Kreemulido, mi pensas, ke vi devas legi la rakonton de Thibaud Guggiari [‘tibo guĝari’] pri la fiŝeto, kiu same estis en malfacila situacio, ne sciis kion fari, sed tamen ekiris kuraĝe por realigi sian revon. Ĉu ĝi sukcesis? Mi ne scias. Dependas de tio, kion ni nomas sukceso. Vi diros al mi je la fino. Sed memoru jam nun: la vojo foje pli gravas ol la celo mem! Jen la historieto. Ek al la legado!

Mi ne scias kie, kiel komenci. Mi neniam sukcesos! Mi dronas en miaj pensoj. Mi ne scias kion fari...

La ulidoj surprizite rigardis unu la alian. Ili volis helpi al Kreemulido, sed ne sciis kiel. Finfine Entuziasmulido ekhavis bonan ideon.

– Venu, Kreemulido, mi pensas, ke vi devas legi la rakonton de Thibaud Guggiari [‘tibo guĝari’] pri la fiŝeto, kiu same estis en malfacila situacio, ne sciis kion fari, sed tamen ekiris kuraĝe por realigi sian revon. Ĉu ĝi sukcesis? Mi ne scias. Dependas de tio, kion ni nomas sukceso. Vi diros al mi je la fino. Sed memoru jam nun: la vojo foje pli gravas ol la celo mem! Jen la historieto. Ek al la legado!

Ek al la legado!








Thibaud Guggiari:
La fiŝo



Jen la historio de malgranda fiŝo, kiu volis vidi la reĝon de la fiŝoj. La reĝo de la fiŝoj estas granda kaj forta fiŝo, sed neniuj scias, kie ĝi troveblas.



Dum ĝia vojaĝo unu pelikano volis manĝi la malgrandan fiŝon, sed bonŝance la malgranda fiŝo estis tre rapida. Ho, estas tre malfacile trovi la grandan reĝon.

		
Ĝi vidis multe da ŝipoj. Kelkaj ŝipoj ĵetis reton por kapti fiŝojn. La fiŝeto devis esti tre diskreta kaj ankaŭ pli atenta. Ĝi vidis fiŝkaptilon, per kiu oni kaptas la fiŝojn por poste vendi ilin aŭ por tuj manĝi la fiŝojn.	Ĝi vidis la riveron Gango en Barato. Ĝi estis tre malpura, ĝi havis multe da malbelaj aĵoj en ĝi, ĉar oni ĵus havis feston tie. La homoj ĵetis domon el bambuo en la riveron Gango por festi diinon.	La fiŝeto pluiris en akvon, kiu tiom malvarmis kiom la norda poluso. Poste en akvon, kiu tiom varmis, kiom la akvo, kiu enhavas vulkanon kaj pro tio la akvo estas tre varma. La fiŝeto devis adaptiĝi al ĉiuj situacioj.
		– Nu, kara Kreemulido, kion vi pensas? Ĉu ĝi sukcesis? Ĝi ja trovis la reĝon, sed samtempe ĝi eksentis sin malbela kaj malgranda... – la eta demando de Entuziasmulido estis samtempe simpla kaj komplika. Tamen, ŝajne ĝi helpis al nia eta artisto, ĉar li tuj eklaboris, kolektis kaj organizis siajn ideojn kaj tute ne plu estis trista, sed tute
Poste ĝi vidis tre belajn aĵojn! Ĝi vidis belajn fiŝojn kun tre belaj koloroj, kaj multe da koraloj, kiuj havis multe da belaj koloroj, kiel la fiŝoj. Ĝi vidis ĉiujn tiujn kolorojn, kaj inter tiuj belaj koloroj, ĝi ne sentis sin bela, ĉar ĝi estis griza kaj ne bela.	La malgranda fiŝo vidis multajn aĵojn dum sia vojaĝo. Ĝi trakuris multe da belaj kaj malbelaj aferoj dum sia tre granda vojaĝo. Fine la fiŝeto ekvidis la grandan kaj fortan reĝon de la fiŝoj, kaj ĝi sentis sin tre malgranda apud la reĝo, kiu estis kun siaj korpogardistoj.	

male, entuziasmega! Li respondis laborante:

– Jes, mi pensas, ke ĝi atingis multon per sia kuraĝo. Laŭ mi, trovi la reĝon estis nur detalo en la procezo. Tio, kio pli gravas, estas ke la fiŝeto kuraĝe alfrontis malfacilaĵojn, ekkonis novajn lokojn, amikojn kaj malamikojn, kaj ĝi malkovris

eĉ sin mem! Mi esperas, ke la reĝo rekompencos ĝian kuraĝon, ke li atentigos la fiŝeton ne kompari sin al la aliaj, kaj ke li eĉ montros al ĝi, kiom perfekta ĝi estas tiel, kiel ĝi estas, ekzemple por eniri la vicon de la reĝaj korpogardistoj, kiuj devas esti ekzakte kiel la fiŝeto: kuraĝaj kaj diskretaj.

Verda Cirko 3

Lanĉo de kajtoj

1. La kuirejo de la avino de Miĉjo

Avino: Mi preparis sandviĉojn kaj plenigis tri botelojn per oranĝosuko. Bonvolu meti ĉion en la dorsosakojn. Ho, kiom bela vetero! Kaj blovas agrabla venteto, ĝuste taŭga por lanĉi kajtojn en la parko. Peĉjo, kie estas via kajto?

Peĉjo: Mi lasis ĝin en la korbo de mia biciklo.

Avino: Bone. Ankaŭ Miĉjo kaj mi jam ŝarĝis niajn biciklojn per po unu kajto.

Miĉjo: Sed, Avino, mia biciklo difektiĝis...

Avino: Ho jes, mi forgesis. Ne gravas. Mi tuj riparas ĝin. Intertempe, vi plenigu la dorsosakojn kaj ordigu la kuirejon. (Ŝi eliras.)

Miĉjo: Mia kajto similas papagon. Por Avino, mi konstruis kajton, sur kiun mi pentris homan vizaĝon. Kiel aspektas via kajto?

Peĉjo: Ĝi similas aviadilon.

Avino: Miĉjo! Peĉjo! Venu ĉi tien. La bicikloj jam pretas!

2. Post kelka tempo, la triopo rajdas biciklojn sur la strato. Subite, la trafiko ŝtopiĝas.

Avino: Ĉu okazis akcidento?

Preterpasanto: Ĉevalo malhelpas la trafikon. Okazas fajrego ĉe la Verda Cirko. Fajrobrigado troviĝas tie por estingi la flamojn. Intertempe, la ĉevalo ektimegis kaj forfuĝis kaj... jen ĝi!

Miĉjo, Peĉjo: Jen ĝi!

Avino: Ĉu ĝi povas esti la sama ĉevalo kiu pasintjare vundiĝis?

Miĉjo: Jes. Sed ĝi de longe resaniĝis.

Avino: Atendu ĉi tie. Gardu mian biciklon.



Mi revenigos la ĉevalon al la cirko.

(Avino saltas sur la ĉevalon kaj foriras kun ĝi.)

Peĉjo: Kiom sportema kaj vigla estas via avino!

Miĉjo: Kompreneble. Ŝi partoprenas la esperantistajn renkontiĝojn de nia grupo. Tie ŝi ĉeestas diversajn prelegojn, kaj tre multaj el ili temas pri sana vivo: sana dieto, sanaj fizikaj ekzercoj, ktp.

Peĉjo: Do, tial ŝi estas tiom sportema! Kaj ŝi estas ankaŭ aparte bela!

Miĉjo: Kompreneble! Unu el la esperantistinoj estas frizistino, kaj ŝi aranĝas la hararojn de ĉiuj samideanoj kun granda rabato.

Peĉjo: Aha! Do tial via avino havas tiom belan blankan harplektaĵon kun rozkoloraj rubandoj!

Miĉjo: Kaj ŝi havas kelkfoje longajn blankajn buklojn!

Peĉjo: Ho!

Miĉjo: Kaj unu el la esperantistoj en nia grupo estas optometristo. Li priskribas okulvitrojn tre favorepreze por la

samideanoj. Kaj li eĉ donacas mojosajn kadrojn por la okulvitroj! Tial Avinjo aspektas tiom bela!

Peĉjo: Mi komprenas. Sed eble ŝi aspektas bela precipe ĉar ŝi estas tre gaja.

Miĉjo: Vi pravas. Ŝi havas multajn geamikojn je ĉiuj aĝoj, kaj tio ĝojigas ŝin. Gaja avino estas bela avino, ĉu ne?

Peĉjo: Eble vi helpu min konvinki ankaŭ mian avinon aliĝi al la grupo de esperantistoj. Ŝi ŝajnas kutime trista kaj soleca...

Miĉjo: Ankaŭ vi povus aliĝi kune kun ŝi.

Peĉjo: Mi ne havos tempon, ĉar mi lernas gitaron.

Miĉjo: Kio?! Ĉu vi lernas gitaron? Kiu instruas vin?

Peĉjo: Juna muzikinstruisto de la kulturdomo. S-ro Majli.

Miĉjo: Sed li estas esperantisto! Li okupiĝas ankaŭ pri la esperantista koruso! Kaj li certe povus helpi vin lerni Esperanton kaj akompani nian koruson.

Peĉjo: Verdire li jam proponis tion al mi. Sed mi pensis ke tio malfacilus...

Miĉjo: Esperanto estas facila lingvo. Ĉiuj lernas ĝin rapide.

Peĉjo: Se ni konvinkos mian avinon lerni la lingvon, ankaŭ mi aliĝos al la grupo. Rigardu! La trafiko normaligiĝis. Jen la kamiono de la fajrobrigadistoj.

Miĉjo: Avinjo! Avinjo!

(Fajrobrigadistoj revenigas la avinon de Miĉjo per sia kamiono.)

Fajrobrigadisto: (al Avino) Dankon, sinjorino! (Al Miĉjo) Vi havas tre bravan avinon! Gratulon! *(La kamiono foriras)*

Avino: Jen, la cirkestro donis al mi tri invitilojn por la ĉi-vespera spektaklo!

Miĉjo, Peĉjo: Bonege!

Miĉjo: Kio okazis ĉe la cirko?

Avino: Okazis akcidento. Iu infano eniris la ĉambron, kie la magiistino trejniĝis por

sia programero. Ŝi klopodis enmeti fajron en sian buŝon kiel eble plej artece. Kaj tiu infano volis imiti ŝin. Li provis ludi per la fajro kaj... kaŭzis fajregon! Tio devas servi al vi kiel grava leciono: neniam provu uzi fajron, kiam oni ne instruis vin tre atente kiel fari tion.

Peĉjo: Jes, certe. Ludi kun fajro estas terure danĝere.

Miĉjo: Avinjo, Peĉjo pensas esperantiĝi kaj volas konvinki ankaŭ sian avinon esperantiĝi!

Avino: Ho, kiom bona ideo! Peĉjo, mi aŭdis ke via avino scipovas triki. Ĉu tio veras?

Peĉjo: Jes. Ŝi trikis ĉiujn miajn jakojn, ĉapojn, koltukojn... Jen, ankaŭ ĉi tiun jakon ŝi trikis.

Avino: Hmmm... Ĝi estas belega! Ni de longe serĉas iun kiu gvidu lecionojn pri trikado, kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj. Ŝi estus ĝuste taŭga por fari tion. Ĉu estas ŝi kiu preparis tiujn bongustajn peklajojn kiujn vi donacis al ni okaze de la Nova Jaro?

Peĉjo: Jes, ŝi scipovas fari mirindajn peklajojn.

Avino: Ŝi povus prepari ankaŭ interesajn prelegojn pri peklajoj... Mi antaŭĝojas renkonti ŝin...

3. En la parko.

Peĉjo: Mia aviadilo flugas zigzage!

Miĉjo: Ha, ha! Mia papago flugas cirkle!

Peĉjo: Nekredeble! Kiel alte kaj bele flugas la kajto de via avino! Ŝajnas ke ĝi atingas la ĉielon kaj perdiĝas inter la nuboj.. Nun mi rimarkas: la vosto de la kajto similas la blankan harplektaĵon de via avino, kun rozkoloraj rubandoj. Kaj sur la vizaĝo de la kajto, videblas okulvitroj kun rozkolora kadro.

Miĉjo: Videblas ankaŭ gaja rideto... Jen kio plej gravas.

Verkis: **José de J. Campos Pacheco (Kubo) kaj Luiza Carol (Israelo).**
Bildo: Odelvis del Sol (Kubo).

Ekspozicio Verda Cirko

En granda salono de la kulturdomo Maria Villar Buceta en la urbeto Pedro Betancourt en Kubo la desegnisto Odelvis del Sol Reyes kaj la geknaboj estis invititaj por ekspozicii.

Belegaj bildoj troviĝas tie kaj pli ol 100 personoj vizitis la salanon. La 8-an de Aprilo je la 11-a horo estis aranĝita la ekspozicio. La ĉefa temo estis "Cirko". Kompreneble temas pri la bildoj, desegnitaj de Odelvis, por "Verda cirko", teatraĵeto verkita de José de Jesús Campos (Kubo) kaj Luiza Carol (Israelo). Tiuj bildoj ankaŭ aperas sur la paĝoj de *Juna Amiko* kaj Verda Cirko estas legebla en JA 4/2023 kaj JA 1/2024.

Tiu brila ideo por ekspozicii la bildojn estis proponita de respondeculinoj de la kulturdomo kaj la galerio.

Antaŭ rigardado de la belegaj bildoj la ĉeestintoj dum la malferma tago ĝuis belegajn kantojn. La muzik-infangrupo (estontaj steletoj – *estrellitas del futuro*), gvidata de Orianny Rolo, kantis du belegajn kantojn. La unua kanzono temis pri magiisto, kiu perdis kolombojn kaj pro tio li ne sukcesas rolludi...

Inter la publiko estis la loka esperantisto Jesús Astiazarain kaj la historiisto Julian Rogelio Alvarez Lopez.

Julian prelegis pri la historio de la cirkoj en Kubo. Li rakontis, ke la plej gravaj cirkoj, kiuj vizitis la urbeton en la 50-aj jaroj (infaneco de la historiisto), dum la spektakloj la rolludantoj aktoris en la nuntempa parko Pedro Betancourt, proksime de la hotelo La Palma.

Julian rakontis pri la plej gravaj cirkoj kiel *El circo Nelson* – Cirko Nelson. La estro de tiu cirko loĝis en Pedro Betancourt, *El circo Nacional* – Nacia cirko kaj *el circo Atenas de Matanzas* – Atenas Cirko. Oni parolis tie pri la spektaklo "Fatima, la virino sen korpo". Tiu spektaklo temas pri virino, kiu parolis kun la publiko kaj neniuj vidis ŝian korpon, nur la kapon. Fantaziaĵo. Nuntempe la cirkaj aktoroj rolludas en la teatro Cuba kaj bedaŭrinde cirko kun tendo ne vizitas *Pedro Betancourt* nuntempe.

Julian ankaŭ memoris pri vizito de cirko de la eksa Sovetunio kaj la spektaklo *Circuba*. Tiu spektaklo estis internacia. Cirkaj rolludantoj estis el Bulgario, Vietnamio, Okcidenta Germanio, ktp, kaj ili rolludis en Kubo.

Dum la ekspozicio Odelvis del Sol kaj José de J. Campos Pacheco estis intervjuataj de la ĵurnalistoj Yadiel Barbón kaj Lianet Fundora Armas – vicredaktorino pri urba ĵurnalo Giron, kaj kelkaj geknaboj ankaŭ estis intervjuataj. La geknaboj sciigis al la ĵurnalistoj pri siaj desegnoj kaj kiel devas aspekti la ĉef-protagonisto (avino) de la teatraĵo "Lanĉo de kajtoj – Verda cirko 3".

Tiu tago estis belega tago! Kaj kelkaj vizitintoj interesiĝis pri la internacia lingvo kaj Esperanto-kursoj.

Verkis: **Julian Rogelio Alvarez Lopez kaj José de J. Campos Pacheco.**





Legu kaj ĝuu

Rubrikestro:

Małgosia Komarnicka

Pollando

malgosia.junaamiko@gmail.com



Vizitu bibliotekon...

Kadre de la Erasmus-programo, kiu estis financata de Eŭropa Unio, la reprezentantoj de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado realigis la projekton “Ponto de espero” kune kun Itala Esperanto-Instituto.

La partoprenantoj de la projekto havis eblecon viziti kelkajn bibliotekojn en bela itala regiono Toskanio kaj ekkoni la italan bibliotekan sistemon. En ĉi-tiu numero mi prezentos unu el la plej valoraj bibliotekoj por ni esperantistoj, la Ŝtatan Bibliotekon kaj Arkivon de Esperanto en Massa (*Biblioteca Nazionale e Archivio di Esperanto*). La tie kolektita E-kolekto superis niajn atendojn. Oni devas nepre viziti tiun bibliotekon.

Dum nia vizitado kun admiro ni observis la laboron de Enrico Gaetano Borrello. Li, kiel volontulo, dum jaroj katalogas Esperantajn kolektojn: librojn, gazetojn, fotojn, korespondaĵojn, diversajn dokumentojn...

Ni eĉ havis eblecon teni enmane kelkajn el ili, kiuj estis kreitaj antaŭ pli ol 100 jaroj.

La membroj de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado gajnis bezonatan bibliotekan sperton dank’ al lernado en la biblioteko kaj arkivo en Massa. Ili jam kreas lokan E-bibliotekon en la sidejo de la organizaĵo. Ĝis nun al ili mankis sperto kaj scio...

Mi proponas vin viziti bibliotekojn, precipe tiujn kun esperantaĵoj. Tie vi pasigos esceptajn momentojn. Tamen memoru, ke ĉiu biblioteko estas minejo de scio, disvolvas pensadon kaj instruas nin entrepreni decidojn...

Klubo de bona libro

La Biblioteko de Juna Amiko por junuloj kaj infanoj kreskas dank’ al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, sendu al la supra adreso, aldonante la noton: “Biblioteko de Juna Amiko”.




Rekomendo

Por la Biblioteko de Juna Amiko mi rekomendas la libron “Mia pentrista vivo por Esperanto kaj por paco” de Helga Plötner. La libron eldonis la japana eldonejo “HORIZONTO” de Jasuo Hori, en la jaro 2023, en la gubernio Gunma.

La aŭtorinon Helga Plötner mi ekkonis antaŭ kelkaj jaroj kaj de unua momento mi fariĝis fanino de ŝia pentroarto. Ni de tempo al tempo korespondas kaj dank’ al tio mi eksciis, ke ŝi estas serioze malsana kaj tre suferas. Tamen ŝi neniam plendas. Ŝiaj leteroj estas ĉiam pozitivaj, substrekas amon al homoj kaj al Esperanto kaj ĉiun leteron ŝi ankoraŭ pliriĉigas per siaj belegaj bildoj.

Unu tagon mi ricevis de ŝi esceptan donacon, la libron “Mia pentrista vivo por Esperanto kaj por paco”. Kun interesiĝo mi ĝin tralegis kaj nun al vi ĝin rekomendas.

La libro konsistas el mallongaj rakontoj kaj multaj bildoj, kiuj ilustras ilin. La teksto de la libro estas skribita tiumaniere, ke ni sentas nin kiel gastoj, kiujn la aŭtorino invitis al sia ateliero kaj libere interparolas, prezentante sian



vivon. En la ateliero estas multaj bildoj kaj tio signifas, ke ŝi ŝatas pentri kaj kun ĉiu bildo ligiĝas historio de ŝia vivo. Ni do ekkonas privatan vivon de la aŭtorino, ŝian familion, amikojn, artajn teknikojn, kiujn ŝi uzis. Ni ekscias, ke ŝi de ĉiam ŝatis pentri kaj sian tutan vivon ŝi ligis kun arto. Legante la libron kaj admirante en ĝi lokitajn bildojn ni observas la evoluon de arta stilo de Helga Plötner, ni ekkonas

ŝiajn proprajn travivaĵojn, elektojn, grandan amon al homoj kaj al Esperanto. Ĉiuj ŝiaj bildoj majstre transdonas belecon kaj harmonion, etoson kaj realecon de pentritaj modeloj. Sendepende, ĉu ili estas homoj, bestoj, floroj, konstruaĵoj, pejzaĝoj ktp...

Tamen la grandparto de artaĵoj de Helga estas portretoj. Ŝi estas perfekta portretistino, kiu ŝategas detalojn kaj havas esceptan subtilan artsenton. Ŝi atente

observas ĉiun sian modelon, precize portretas kaj enmetas en ĉiun bildon multe da amo.

Mi estas konvinkita, ke ĉiu leganto de la libro konstatos, ke pentroarto estas vivmisio de la germana pentristino kaj esperantistino. Mi invitas vin al la escepta pentra mondo de Helga Plötner.

Lando de drako kaj ĝiaj flago kaj blazono

La astrologia jaro de la Drako komenciĝis en Februaro. Ĝi supozeble alportos al ni feliĉon kaj prosperon, ordon kaj sekurecon. Oni diras, ke la drako subtenas la regulojn kaj principojn kaj do bonaj agoj de la Drako influos multajn aspektojn de nia vivo. Ĉu estos tiel? Ni konvinkiĝos post unu jaro...



Mi jam invitas vin al la lando de feliĉo, al lando kiel el fabelo, al lando de unika kulturo, al lando de la drako...

La flagon de la lando kiel kutime priskribos itala esperantistino, Cristina Bolini (fine estas informo pri ŝia libro) kaj mi prezentos la landon, ĝian blazonon kaj trovitajn legendojn.

*) Vidu paĝojn 31-36.

Majo 2023 / 23

Butano

Butano aŭ Reĝlando Butano (drakolando) estas la sola himalaja budhisma ŝtato en la mondo. Ĝi estas la plej malgranda lando de la azia kontinento, fama pro sia tre alta nacia montrilo de feliĉo malgraŭ, ke plimulto de loĝantoj estas malriĉa. Alveninto el la tiel nomata okcidenta mondo rapide rimarkas, ke en ĉi tiu loko la tempo pasas tre malrapide kaj al li estas malfacile kompreni tute malsamajn valorojn de la butana kulturo, vivfilozofion, vivritmon, hommentalon, ol valorojn de la okcidenta modelo de civilizo.

Por butananoj tre gravaj estas himalajaj pintoj, kiuj laŭ ili estas loĝataj de spiritoj. La naturo estas ege grava. Butano estas unusola lando en la mondo, kiu vere zorgas pri media protekto. Ĉi tie estas kompleta malpermeso de fumado. Ankaŭ preĝo kaj meditado estas gravaj. Troviĝas ĉi tie specialaj lokoj por meditado, monaĥejoj, kiuj estas ofte konstruitaj sur pintaj rokoj en altaj montoj. Atingi perfektecon per preĝo kaj kontakto kun naturo estas tute natura ĉi tie en Butano.

Butano havas riĉan kaj unikan kulturan heredon. Ĝi estas senŝanĝa pro la izoliteco disde la mondo ĝis la fruaj 1960-aj jaroj. Tio kaŭzas, ke la kulturo kaj la tradicio de la lando estas unu el ĉefaj allogaĵoj por turistoj. Tamen, turismado estas tre limigita, ĉar temas pri konservado kaj daŭrigado de la nuna kulturo kaj tradicio de la lando.

Arkitekturo de la lando karakteriziĝas per speco de kastelo-fortikaĵo, konata kiel la dzongo, kiuj jam ekde antikvaj tempoj funkciis kiel la religiaj kaj sekularaj administracio-centroj. Butano havas multajn festotagojn, la plej granda parto el ili festas la jarsezonojn kaj estas religiaj



Blazono de Butano

festivaloj. En la lando estas multaj belaj elstaraj konstruaĵoj, temploj, palacoj, stupaoj (pagodoj), monaĥejoj kaj statuoj. Ĉiu vojaĝo al Butano estos certe eksterordinara vojaĝo, kiu ebligas al vi regreson en tempo kaj spaco al lando plena de tibeta magio, preskaŭ netuŝita de civilizado. Vi do havos eblecon admiri multajn interesajn ankoraŭ ne malkovritajn de turistoj lokojn en la mondo. La loĝantoj de Butano volas nomisian landon Druk Yul kaj do Reĝlando de Tondra Drako. Laŭ ili la drako tondris antaŭ dek jarcentoj, sed ne por timigi kaj minaci, sed por proklami budhismon. Fundamenta principo de budhismo estas: ju malpli da deziroj vi havas, des malpli vi suferas, kaj des pli feliĉa vi estas.

Unu el la naciaj simboloj de Butano estas la nacia flago. Sur ĝi estas videbla drako dum la tuta jaro. Butano en la dzongkha lingvo estas nomata "Druk Yul" (Regno de la Drako). Drako aperis sur la flago de Butano ekde la jaro 1947, kiel simbolo de energio kaj bonvolo. Oni diras ke, ekde la komenco de la 20-a jarcento, la guberniestroj de Butano adoptis, de la najbara Ĉinio, drakon kiel simbolo de suvereneco. Drako etendiĝas sur la du koloroj de la flago: sur la flavo, kiu reprezentas civilan tradicion kaj la ŝtatan aŭtoritaton (Reĝo Drako de Butano – Druk Gyalpo) kaj sur la oranĝkoloro, kiu reprezentas la budhanan religion.

La drako simbolas la gravecon de la civila regno kaj de la monaĥaj tradicioj ene de la lando, kaj estas simbolo de forto, kiu ligas la suverenon al la homoj.

Ĝia blanka koloro simbolas la kuniĝon de ĉiuj etnaj kaj lingvaj grupoj de Butano, kiu havas komune la purecon de pensoj kaj agoj. La malfermita buŝo de la drako

en la klasika grumblado reprezentas la engaĝiĝon de la diaĵoj pro la defendo de la lando. Drako tenas en siaj ungegoj kvar juvelojn, kiuj simbolas la riĉecon de la lando kaj la sekurecon de ĝia loĝantaro.

La oficiala nacia emblemo de Butano estas la blazono, kiu havas cirklan formon. Ene de la ruĝa rondo troviĝas duobla simbolo de dorĝe (Dorĝe*), kiu reprezentas harmonion inter laika kaj eklezia aŭtoritato. La floro de lotuso simbolas moralecon; kaj la juvelo esprimas suverenon potencon; kaj troviĝantaj en ĝi du drakoj (maskla kaj ina) signifas la nomon de la lando.

La simboloj, kiuj troviĝas en la blazono havas siajn radikojn en budhismo.

[Aĉeti paperan aŭ e-pub version de la libro de Cristina Bolini vi povas vizitante: <https://www.youcanprint.it/flagoj-historio-kaj-kuriozaĵoj/b/5fd68326-c8db-52f2-9adb-1ab36264316e/>, aŭ pere de Amazon: https://www.amazon.it/Flagoj-Historio-kurioza%C4%B5oj-Cristina-Bollini/dp/B0B282PDNK/ref=sr_1_1?__mk_it_IT=%C3%85M%C3%85C5BD%C3%95%C3%91&crid=ZDPUGKNV1ZTA&keywords=Flagoj&qid=1675710277&srefix=flagoj%2Caps%2C177&sr=8-1]

Butanaj legendoj

Dum jarcentoj, butanaj legendoj estis transdonitaj nur parole. Ili estis skribitaj nur en la lastaj jaroj. En ĉi tiuj mitoj kaj popolaj rakontoj, krom magio, ni ofte trovas multe pli da vero pri homoj kaj pri la loko, en kiu ili loĝas.

Kiel ekestis la templo Paro Taktsang

Paro Taktsang, ankaŭ konata kiel la Nesto de Tigro, estas budhana templokomplekso en Himalajo sur la klifoj de la valo Paro en Butano. Ĉi tiu konstruaĵo estas la simbolo de Butano kaj ĝia plej sankta loko. Laŭ la legendo, en la 8-a jarcento, Guru

Padmasambhava, nomita Rinpoĉe, flugis sur la dorso de tigrino, kaj sur la loko de lia alteriĝo, kie li meditis, estis konstruita Paro Taktsang-templo.

La monaĥejo situas en mirinda loko, 900 metrojn super la Valo de Paro, "gluita" al la rokoj je alteco de 3.000 metroj super la marnivelo. Ĝis hodiaŭ estas sekreto kiumaniere la kreintoj venkis la teknikajn barojn dum ĝia konstruado. Ili ja devis transporti ĉiujn materialojn al ĉi tiu alteco, kio faras la lokon ankoraŭ pli unika.

Kunlaboro valoras

La plej populara butana fabelo rakontas pri kvar amikoj. Ili estas bestoj: pavo, kuniklo, simio kaj elefanto. Dum malsato ili decidis kunigi siajn fortojn por kune atingi manĝaĵojn kaj neniam esti malsataj.

La pavo trovis semon kaj plantis ĝin. Tiam la kuniklo akvumis ĝin. La tasko de la simio estis sterki ĝin, kaj de la elefanto gardi ĝin. Kia estas moralo? Kunlaboro valoras, ĝi donas fruktojn al ĉiu.

Arkafado

Arkafado estas oficiale nomita la nacia sporto de Butano. Ĝi havas longan tradicion. Laŭ la legendo, antaŭ centoj da jaroj, la hindua princo Sidarto gajnis la manon de princino Yasodhara (Jaŝodaro) grandparte dank' al siaj lertoj pri arkafado. Li poste iĝis konata kiel Budho (Sidarto Gotamo aŭ Budho Gotamo), la fondinto de budhismo, kiu estas la ŝtata religio en Butano.



*) https://eo.wikipedia.org/wiki/Kloŝo_kaj_vajra



Vizito en Vroclava Urbodomo

La 13-an de Februaro 2024, membroj kaj simpatuloj de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado renkontiĝis kun la Prezidanto de Vroclavo Jacek Sutryk.

Kontraŭe al superstiĉo, la “dektria” montriĝis tre pozitiva kaj ne malbonŝanca tago.

Nia grupo amasiĝis ĉe la Vroclava Urboplaco, antaŭ la fontano “Zdrój”, kaj tuj akurate je la 14:00 ni estis invititaj al la Urbodomo. Tie atendis nin Jarosław Krauze, longjara Konsiliano de la Vroclava Urba Konsilio, surhavante specialan festan skarpon super siaj vestoj. Li estis akompanata de la direktorino de la Vroclava Centro de Socia Disvolviĝo, Dorota Feliks, kaj la administranto de la Triaga Spaco, Katarzyna Delikowska kaj Agnieszka Żebrowska.

Irante al la urbpredizanta kabineto, ni haltis ĉe la sekretario de la Vroclava Urbodomo. Ĝi estas bela loko kaj Jarosław Krauze rakontis al ni interese pri ĝia historio. Tie, sur la fenestro, estas statueto de la plej fama kato de Vroclavo, Wrocek. Bedaŭrinde, dum nia vizito, la vera kateto dormis...

Wrocek estis trovita en la busstacidomo de Vroclavo kaj unu el la homoj pretaj

prizorgi ĝin estis la urbpredizanto. La nomo de la kato estis elektita de la loĝantoj de Vroclavo en reta voĉdono. La favorato de Vroclavo pasigas siajn tagojn en la kabineto de la prezidanto kaj siajn noktojn ĉe lia domo.

Enirante la prezidantan kabineton, ni estis surprizitaj, ke ĝi estas granda, ampleksa kaj bele ornamita ĉambro. Jarosław Krauze ankaŭ rakontis al ni interesan historion pri ĝi. Nia grupo sidis en komfortaj brakseĝoj malantaŭ grandega tablo. Post mallonga, senĝena interŝanĝo de vortoj, ni rakontis al la prezidanto pri la agado kaj kreemo de nia grupo. La prezidanto estis agrable surprizita, vidante niajn belajn dulingvajn (en la pola kaj Esperanto) eldonaĵojn: la gvidilon “Spacerkiem po Wrocławiu – Promene tra Vroclavo” kaj la unuan parton de la libro kun legendoj “Legendy sześciu kontynentów – Legendoj de ses kontinentoj”. Ravitecon de la prezidanto elvokis la nova vroclava legendo, “La legendo pri Joĉjo kaj Margarenjo, la vroclavaj koboldoj kaj la drako Strachota” kaj la donacita pentraĵo de Irenka Solarek, ilustranta la vroclavan legendon. La prezidanto aŭskultis kun granda intereso pri la lingvo Esperanto, en kiu estis eldonitaj ambaŭ donacitaj libroj. Li admiris la Esperanto-revuon “Juna Amiko”, kiu de tempo al tempo publikigas informojn pri Vroclavo aŭ la laboro de nia grupo.



En la Galerio de Famaj Vroclavanoj.



Parto de nia grupo.



Małgosia kaj Irenka kun la prezidanto.

La prezidanto tre volonte fotis sin kun Małgosia kaj Irenka, kiuj tenas la revuon “Juna Amiko”, kiu enhavas priskribon de Vroclavo. Nia tuta grupo ankaŭ fotis nin kun la prezidanto, kaj Renia havis eblecon teni tre pezajn ŝlosilojn de la urbaj pordegoj.

La renkontiĝo kun la prezidanto daŭris iom pli mallonge ol ni atendis, sed ni ĉiuj komprenis perfekte, ke en Pollando ĵus komenciĝis lokaj elektoj kaj tial la prezidanto ne povis dediĉi pli da tempo al ni.

Ni do havis la okazon daŭrigi nian vizitadon kaj ekvidi, kie laboras lokaj registaraj oficistoj.

Jarosław Krauze denove ĉarmis nin per siaj scio kaj maniero rakonti. Dank’ al li, ni ne nur ekkonis la historion de aliaj gravaj lokoj de Urbodomo, sed ankaŭ ni eksciis pri la aktualaj urbaj aferoj kaj ni povis ludi plurajn gravajn rolojn. Małgosia, Renia kaj Tereska sidis malantaŭ la prezidanta skribotablo. Małgosia, kiel la “prezidanto”



Małgosia prezentas esperantaĵojn al la prezidanto.



Kun bastono dum la kunsid-malfermo.

de la Urba Konsilio, malfermis kaj fermis la kunsidon, frapante la prezidantan bastonon. Ryszard pozis kiel la prezidanto, Grazia kiel la vicprezidanto kaj Bogdan kiel la departementa direktoro. Ni eksciis, ke la sesioj de la Urba Konsilio de Vroclavo estas senpere rete prezentataj al la publiko.

La lastan lokon, kiun ni vizitis, estis la ĉambro, en kiu troviĝas la Galerio de Famaj Vroclavanoj.

Estis tre agrable pasigita tempo. Akompanis nin unika etoso kaj bele prezentita historio. Ni estis tre kontentaj, ke ni povis viziti tiel gravan lokon, ekkoni devojn de multaj homoj laborantaj tie, kaj eĉ eksenti nin kiel ili por momento... Tre impresis nin la renkontiĝo kun la prezidanto kaj lia interesiĝo pri la lingvo Esperanto.

Ni estas kreiva kaj tre aktiva grupo, do baldaŭ ni denove renkontiĝos kun la prezidanto de Vroclavo, por prezenti al li la novajn projektojn, kiujn ni nuntempe efektivigas...

Joasia Kwiatkowska kaj Małgosia Komarnicka



Nia grupo kun la prezidanto.

Feliĉaj, kreivaj kaj aktivaj pliaĝuloj

Lunde la 4-an de Marto 2024, en Góra, Pollando, en la Kultura Centro, komenciĝis la programo “Feliĉaj, kreivaj kaj aktivaj pliaĝuloj”, organizita de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado el Vroclavo kaj Esperanto-Klubo el Góra.

Ambaŭ organizaĵoj prizorgis la artan programon. Vroclavon reprezentis fantazia altranga dancgrupo Espero, kaj Góran talentaj membroj de la Esperanto-Klubo.

Bonvenigis la publikon Małgosia Komarnicka, prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, kaj Teresa Sibilak, prezidantino de Esperanto-Klubo en Góra.

Grupo de Esperanto-lernantoj en Góra prezentis poemojn, skeĉojn, rakontojn kaj kantojn en Esperanto kun traduko al la pola. La dancgrupo kun la Esperanta nomo “Espero” dancis interalie laŭ Esperantaj kantoj de la franca esperantisto JoMo, dancigante la publikon.

La gastigantoj ankaŭ donis bongustajn refreŝigaĵojn dum la renkontiĝo, la kukojn

bakis Basia Seminowicz kaj la kukon en Esperantaj koloroj bakis Basia Jarzab.

La ĉeestantoj bonege amuziĝis, same kiel la specialaj gastoj, kiuj per sia ĉeesto graciis la pretan programon: la urbestro de Góra Irena Krzyszkiewicz, ŝia deputito Magdalena Głuszko, la distriktestrino de Góra Urszula Szmydyńska, la prezidantino de Góra Universitato de la Tria Aĝo Urszula Bujek kaj la fondintino kaj la unua prezidantino de la Universitato Regina Kumala.

Tiu ĉi bela renkontiĝo, plena de ĝojo, kantoj, dancoj, poezio, humuro kaj dolĉeco, finiĝis per la kantado de la kanto “Knabineto” en Esperanto.

Antaŭe Małgosia kaj Tereska disdonis la pretan tekston al la ĉeestantoj kaj klarigis la “Esperantan prononcsistemon”.

Małgosia kaj Tereska finis tiun ĉi unikan programon, dankante ilin pro ilia partopreno kaj, nome de la organizantoj, enmanigante diplomojn de danko al la reprezentantoj de la prezentantaj bandoj. La urbestro ankaŭ enmanigis malgrandajn donacojn al la partoprenantoj kaj organizantoj.

Kiam ni disiĝis, ni jam planis alian renkontiĝon, sed ĉi-foje en Vroclavo...

Waldek Bielecki



Monda Socia Forumo 2024: Alia mondo eblas

Monda Socia Forumo 2024, kiu okazis en Katmanduo, Nepalo, de la 15-a ĝis la 19-a de Februaro, kunigis aktivulojn el la tuta mondo, sub la temo “Alia Mondo Eblas.”

Katmanduo, kun sia riĉa etna diverseco, funkciis kiel vivoplena fono por la monda kunveno, kunigante voĉojn kontraŭ maljusteco kaj defendante pli justan mondon.

La forumon ĉeestis aktivuloj, reprezentantaj 1252 organizojn en 92 landoj. La diversega grupo da partoprenantoj montris la mondan engaĝiĝon al socia justeco.

Malgraŭ la fakto, ke ĝi estis novnaskita, Himalaja Asocio faris signifan impreson per originala stando kaj fulmkoncerto pri paco, danke al financa subteno de Universalas Esperanto Asocio kaj grupo de privatuloj. Danke al kunigo de 25 pacvolontuloj, la asocio aktive partoprenis en marŝo longa 3 km tra la urbocentro en la unua tago, allogante atenton de miloj da observantoj dum almenaŭ 3 horoj. Partoprenantoj kaj volontuloj aperis dum kvin tagoj per multkultura ekspozicio,




kreskigante bonajn interkonektojn kaj kontaktojn kun homoj el diversaj partoj de la mondo.

Esperanto ŝajnis nova kaj nekonata lingvo inter la vizitantoj de Sud-azia origino, precipe por Nepalanoj. Dum kelkaj eŭropaj kaj amerikaj vizitantoj jam aŭdis pri la lingvo, la kono ĉe Sud-azianoj estis limigita.

Estis altaj atendoj, precipe de junularo kaj gepatroj, koncerne trejnadon kaj kapablokreskadon en la kampo de paco kaj homaj rajtoj, kie Esperanto povus servi kiel unu el la iloj. Por plifortigi la kreskon de la lingvo en Nepalo, estis rekomendite evoluigi agadodirektitajn projektojn por junularo, fokusitajn al paco kaj homaj

rajtoj. Inter la disdonitaj materialoj, la libreto pri “Esperanto per Rekta Metodo” de Stano Marček montriĝis kiel la





plej postulata, indikante grandan intereson lerni pri la lingvo tra alireblaj rimedoj. La Esperanto-stando, ornamita per presitaj materialoj kaj ciferecaj ekranetoj, montriĝis kiel centra allogo inter centoj da aliaj standoj. La stando allogis atenton de almenaŭ 800 homoj, el kiuj 436 montris specifan interesiĝon pri Esperanto kaj prenis rilatajn materialojn dum la forumo.

Por antaŭenigi la celojn de Esperanto en Nepalo, oni devus evoluigi agadodirektitajn projektojn, aparte tiujn rilatajn al paco kaj homaj rajtoj, celante la junularon. Monda Socia Forumo 2024 en Katmanduo provizis platformon por signifa monda dialogo, kun Himalaja Asocio kaj Universala Esperanto-Asocio, farante gravajn kontribuojn kaj starigante scenejon por daŭra kunlaboro.

Prakash Khadka, Himalaja Asocio



Rubrikestro:
Elena Nadikova,
la gvidantino
de Esperanto-klubo
“Betuleto”, Rusio.
lana_espero@mail.ru



Drakoj alportos bonŝancon

Saluton, karaj legantoj!

Interkultura Mondo invitas
vin, kiel kutime, iom vojaĝi tra
mondaj diverspopolaj tradicioj.

Ĉi-foje nia esploro rilatos al bestoj, pli
precize – al timigaj bestoj, monstroj.
Ja alvenis kaj vaste marŝas ankaŭ la
orienta Nova Jaro. Kaj niaj ĉinaj samideanoj

invitis nin paroli pri drakoj.

Drako estas kolektiva nomo por estuloj,
kiuj ekzistas en mitoj kaj folkloroj de
multaj popoloj de la mondo. Imagoj pri
drakoj diferenciĝas depende de la monda
regiono. Kvankam ilia aspekto pli-malpli
similas tra diversaj mitologioj. Drakoj en
Okcidento kutime havas serpentaspektan
korpon, unu aŭ kelkajn kapojn, flugilojn kaj
krurojn kun ungegoj. Orientaj drakoj pli



Drako en Tajlando



Verko el islanda artistino
Eirdís Ragnarsdóttir.

similas al gigantaj serpentoj. Pentristoj ofte desegnas drakojn kiel monstroj, similaj al dinosaŭroj.

Do, kial drakoj similas al serpentoj en homa menso? Sciencistoj opinias, ke tiuj imagoj estas ligitaj al la timo de niaj antaŭuloj antaŭ realaj serpentoj. Ja multaj el ili estas venenaj kaj tial danĝeraj por homoj. Serpentoj ankaŭ ŝajnis al praaj homoj magiaj pro siaj specifaj “rigardoj”.




Drako en Koreio.

Probable, pro tio multaj antikvaj popoloj opiniis, ke serpentoj estas saĝaj bestoj. Historio scias, ke en praaj tempoj multaj popoloj diigis serpentojn. Ekzemple, en mitoj de amerikaj indianoj ekzistis Korna Serpento (en la angla: *Horned Serpent*). En diversaj indianaj triboj Korna Serpento asociiĝis kun potencoj de akvo, fulmo kaj tondro. Oni nomis ĝin ankaŭ Granda Serpento.

Unuaj priskriboj de drakoj estis faritaj en antikva Proksima Oriento kaj Mezopotamio. Legendoj pri naturaj fortoj – veteraj diaĵoj, kiuj venkas gigantajn serpentojn, ekzistas preskaŭ en ĉiuj hindoeŭropaj kaj proksimorientaj mitoj.

Serpento-drakojn ni renkontas en mitologioj de Antikva Egipto, Eŭropo, Hindio, Ĉinio kaj aliaj landoj de Azio. La nomon de drako ni renkontas ankaŭ en religiaj libroj, ekzemple, en Biblio.

En Okcidento drakoj pro sia fortego plej ofte estis minacaj bestoj, kiuj strebis mortigi heroojn. Tiaj estis drakoj, ekzemple, en slavaj popolaj kulturoj. En fabeloj herooj forhakis multajn kapojn de drakoj – de 3 ĝis 12 – kaj savis belulinojn, kiujn monstroj ŝtelis. En Mezepoka Eŭropo



Knabo He Qizheng (Ĉinio)
pentris la drakon.



La bonaŭgura Pajano de Tajlando.

aperis legendoj pri batalantoj kun drakoj, ekzemple, fama rakonto pri Sankta Georgo. En postaj tempoj oni ofte uzis desegnaĵojn de drakoj sur blazonoj.

En Oriento figuro de drako havas alian sencon por popolanoj. Drakoj de Oriento favoras al homoj. Ili kapablas alporti bonŝancon, forpeli malbonajn fantomojn. En Hindujo oni nomas drakojn “nagoj”. Nagoj ordonas al akvoj kaj Tero. Ili estas tre saĝaj kaj havas grandegajn riĉaĵojn. Japanaj drakoj preskaŭ tiom fortas, kiel Dioj. Drakoj posedas gigantajn sciojn kaj saĝecon. La plej potenca inter japanaj drakoj estas Randzin. Ĝi estas caro de ĉiuj maroj kaj oceanoj. Ĉina drako estas simbolo de bona aŭguro kaj potenco. Ĝi havas kosman energion kaj ordonas al ĉiuj fortoj de la Naturo. Drako alportas bonŝancon kaj ĉiuj ĉinoj salutas kaj omaĝas ĝin. Fakte antaŭ pli ol 3 000 jaroj la kulturo de drako jam furoris en Ĉinio.

Pri tio kaj aliaj faktoj pri drakoj vi povas ekkoni, karaj legantoj, se vi vizitos ekspozicion, kiun preparis niaj ĉinaj samideanoj el TEA – Tianjin-a Esperanto-Asocio. Ekde 2020 ili realigas projekton por kolekti diverslandajn prezentaĵojn pri la bestoj de la Ĉina kalendaro. Partoprenas esperantistoj el diversaj mondopartoj. Iliaj rakontoj, fotoj, prezentaĵoj, kompilas ekspozicion, kiun vizitas miloj da homoj, ne nur esperantistoj. Interkultura Mondo jam rakontis pri tiu projekto (vidu numeron 1/2023 de *Juna Amiko*).

Ĉi-jare la ekspozicio estis dediĉita, kompreneble, al drakoj. De la 10-a ĝis la 25-a de Februaro 2024, 63 personoj el 16 landoj prezentis 19 rakontojn pri drakoj popularajn en diversaj anguloj de la mondo. Ili sendis siajn videojn, sonregistraĵojn, fotojn kaj tekstojn en 10 lingvoj: ĉina, angla, rusa, vjetnama, hispana, portugala, germana, slovaka kaj itala, kaj Esperanto. La prezentataj enhavoj abundas kaj rilatas al kulturoj, popolaj moroj kaj kutimoj, mitoj, legendoj, fabeloj, arkitekturo, arto, pentraĵoj, historio, geografio, arkeologio, lingvistiko, religio, media protektado, naciecoj, festoj, muzikoj, literaturoj kaj pitoreskaj pejzaĝoj. Kaj en la 16 tagoj de la drakojaro laŭ la ĉina tradicia luna kalendaro 1 859 homoj legis la rakontojn 3 235 fojojn. Jen estas la ligiloj:

<https://mp.weixin.qq.com/s/91ZFVkmmlzDxod1iozOXbw>



Infangardeno de la Urbo de Cwangju,
infanoj desegnis drakojn.



La novjara etoso de Vjetnamio.

Kiel kutime multe riĉigis la projekton ankaŭ pentraĵoj de lernejoj de elementaj lernejoj kaj mezlernejoj de Bosnio-Hercegovino, Rusio kaj Ĉinio. Kontribuis ankaŭ artistoj el Ĉinio, Rusio kaj Islando. Jen estas la ligiloj:

https://mp.weixin.qq.com/s/7rMKSSTKacP8IXenmx_0GQ



Drakaŭto en Draka Festivalo en Chekmer Village, Hungario.



Emblemo Dragon Bird Piazza en Middle School, Alton, Ilinojso, Usono.

Nova bona rezulto, ĉu, karaj legantoj? *Interkultura Mondo* ĝoje gratulas niajn ĉinajn amikojn kaj ĉiujn samideanojn, kiuj kontribuis al tiu bela iniciato! **Esperanto ĉiam servu al reciproka prospero, interkultura kompetento kaj evoluo de iuj ajn utilaj kaj interesaj projektoj!** Kaj por tio Interkultura Mondo bonvenigas ĉiujn esperantistojn proponi siajn proprajn iniciatojn, ideojn, projektojn **pere de Esperanto** por pliriĉigi nian kulturon kaj interkulturon!

Interkultura Mondo esprimas koran dankon al Tianjin-a Esperanto-Asocio kaj persone al la sinjorino Lisha LIN (Lisa) pro la disponigitaj materialoj pri la ekspozicio-2024! En la artikolo estis uzitaj ankaŭ malfermitaj publikaĵoj pri drakoj el ruslingva parto de Interreto.



Drako kiel simbolo de savo, A. Bondarenko, Rusio.

Drakoj invitas teumi...

La 27-an de Novembro de 2019 en la 74-a ĝenerala asembleo de Unuiĝintaj Nacioj estis anoncita, ke la 21-a de Majo en ĉiu jaro estu Internacia Tago de Teo, por laŭdi rolon de teo en disvolviĝo de ekonomio, socio kaj kulturo.

Okaze de la kvina Internacia Tago de Teo mi volas priparoli kelkajn sciojn pri teo.

Tearbo (botanika termino “*camellia sinensis*”, kamelio ĉina) estas bela ligneca ĉiam-verda planto, originanta de la ĉina suda landparto. Fakte, en la historio homoj provis multajn herbojn, florojn kaj plantojn en la naturo por refreŝiĝo, mallaciĝo, rito kaj gajno de inspiro de arto. Ekzemple, en la suda Pacifiko popularas la kutimo trinki kavaon, kiu havas historion de pli ol 3 000 jaroj. Kavao estas farita el kavaopirujo, planto tre simila al nigra pirujo. James Cook, brita aventuristo, en sia libro *La Notoj de Kapitano Cook pri Lia Vojaĝo de Eltrovo* menciis pri sia vojaĝo en Tongo en Septembro de 1773: “...kelkaj personoj forte maĉis radikojn kaj branĉojn kiel viskazan likvaĵon, kaj poste sputis la likvaĵon en saman ujon.

Sekve ili metis akvon enen kaj filtris la miksaĵon per delikata fibro kiel lipharoj, filtrita likvaĵo estas trinkebla.” Komence kavao estis uzata kiel medikamento.

Same kiel kavao, teo komence estis uzata por kuracado, sed la produkto ne estis tiel “stranga” kiel kavao. Laŭ legendo, Shennong (Sennongo 神农) estas la unua homo, kiu uzis teon kiel trinkaĵon. En la legendo Shennong estis inventinto de agrikulturo kaj medicino, li havis



Murpentraĵo.

kristalan kaj travideblan ventron. Lutage, glutinte iun folion, Shennong vidis, ke la folio foje kaj refoje frotpurigas la stomakon kaj inteston, rezulte ĉiuj toksoj estis eliminataj. Tial Shennong nomis la planton kun tiu ĉi folio CA (擦 frot), kio signifas “frotpurigon”, la prononco estas CA, tio estas la origino de la prononco de teo (茶), kies prononco estas ĈA.

« Shennong estas magia persono sen sciencaj atestoj. Tamen, li eble simbolas tribajn gvidantojn de primitiva socio, vivantajn en la suda landparto de Ĉinio antaŭ pli ol 5 000 jaroj. En Ĉinio, laŭ la Blua Rivero Jiangzio la moro trinki teon plivastigis de la sudokcidenta parto al la nordorienta parto. En la mondo de Ĉinio teo iris en aliajn partojn ĉefe per tri vojlinioj: orienten





teo iris en Japanion tra maro; okcidenten eniris en *Tubo-n* (吐蕃, tibeta reĝimo de Ĉinio), Mongolion, Mezan Azion kaj Iranon, kaj plue en Rusion kaj najbarajn slavajn landojn; kaj trie teo unue eniris en Brition kaj aliajn eŭropajn landojn, kaj de ili plivastiĝis al aliaj anguloj de la mondo, inkluzive de Ameriko, Indonezio, Hindujo, Srilanko, Aŭstralio, Nov-Zelando, Fiĝioj, Maroko kaj Orienta Afriko. Nun en la mondo pli ol 60 landoj produktas teon kaj proksimume du trionoj da monda loĝantaro trinkas teon.

Tianjin-a Esperanto-Asocio (TEA) lanĉis internacian projekton de kulturaj interŝanĝoj “Teo, Amo kaj la Mondo” en 2019, ĝis nun montriĝis fotoj, videaĵoj, diversaj specioj de teo, abundaj te-trinkiloj kaj libroj... en 14 urboj en 10 landoj danke al esperantistoj kaj te-amantoj.

Vi estas ĉiam bonvena al la projekto (bonvolu kontakti nin: TEAESPERANTO@hotmail.com).

En Ĉinio, precipe en Pekino, la ĉefurbo, se oni demandas vin: “Ĉu vi jam manĝis?” – tio signifas: “Saluton!” Do, ĉu vi trinkas teon?

Interkultura Mondo esprimas koran dankon al Tianjin-a Esperanto-Asocio kaj persone al la sinjorino Lisha LIN (Lisa) pro la disponigitaj materialoj kaj siavice bonvenigas ĉiujn samideanojn gustumi ne simple teon, sed Esperanto-teon!

Krucenigmo >

La solvon bv. sendi al: redakcio@gmail.com. Unu el la solvintoj (decidos loto) ricevos donace la verkon “107 krucenigmoj en Esperanto” de la aŭtoro Stano Marček.



	LA UNUA KASITA PROVERBO	SIMBOLO DE AMPERO	PLENA VORTARO		FARAS IONIA	MAL- JUNUL- AGUL	LA DUA KASITA PROVERBO
SUPRA KORPO- PART'				MAL- MULTE FEMAL'			
ADVERBA FINAJO		FRESA, RAPIDEGA NEGIS					
AVIADILA SIMBOLO DE NORVEGIO			METALA MONTRIL' PURA, DE- FINITIVA				
REZINO- RICA LIGN'			PREPO- ZICIO NATURA BASENO				
TIA- MANIERE				NOMO DE LA 16-A LITERO- MARGUSTA			
EKZISTAS						AKUZATIVA FINAJO TREMIGI DANGERO	
ROMANE 1000		VIRINA NOMO MEZURUNO (bruligilo)					
POST- SKRIBO			OLIBRICA FRUKT' KORTA BIRD'				
SUFIKSO DE PASIVA PREZENZA PARTICIPIO			KOR- INKLINI KOVRAS PER ORO				
LIGILO EL KUN- IGITAJ RINGOJ				SIMB. DE RIDO- MAL- JUNAS			
MAL- KOREKTA						INFINITIVA FINAJO SUSITA KUDRILEG	
SIMBOLO DE SULFURO		MAL- STUTIAN- KOTA VIRA JUP'					
NUME- RALO			NATRIA KLORIDO POSEDATA DE TIU				
METALA KUN-IGIL'			KON- JUNKCIO TICMONTA NUMERALO				
ELEKT- ITAR'				VIKAJMI MONTO- KUN PASTEJOJ			
ĈIELE MALPEZA						ADJEKTIVA FINAJO LA GASOI ĈIRKAŬNI	
SIMBOLO DE SIMENSO		GRUP' DA LITEROJ FARITA DE HOMO					
SIMBOLO DE TANTALO			VICIG' POR KONTROLO AMUZ- KUNVENO				
GRANDA LIGNECA PLANT'			VALORA METALO VULKANA ELFLUJO				
LOGEJ' POR BRUTOJ				SUFIKSO (FRAKCIO) SENARVA, MALHUMIDA			
RAPIDE MOVIGAS MAL- SUPREN						AUTONOMB. DE SVEDEO KURANA DANC'	
SUB- STANTIVA FINAJO		DEDICU, DONACU AFABLA DEZIRAD'					
PRENU (SUR RECEPTO)			INTERES- PROFES- VIRA VESTO				
GERMANA E-JUNU- LARO			KUN KOR- INKLINO JUNULARA SEKCIO				
TUTE MAL- GRANDAJ				ONOMATO- PEO (remon) SUFIKSO (TIMORO)			
GERMANO APUD ELBO						LA SESO TONO ROMANE UN U	
LIRIKA POEMO			PREFIKSO (malgusta faro)				

Esperanto-Poŝtkruciĝo – sepjara projekto

Antaŭ sep jaroj, la 25-an de Marto 2017, estis lanĉita Esperanto-Poŝtkruciĝo (EoPK) – projekto de MASI pri interŝanĝo de bildkartoj en Esperanto inter homoj el diversaj mondopartoj.

Penante superi grandajn teknikajn kaj geopolitikajn malfacilaĵojn, perdante dekojn da membroj kaj akirante unuojn, ĉi tiu modesta amikiga agado plu vivas, aldonante sian guteton al la internacia komunikiĝo kaj plia interkompreno inter la homoj de “la mond’ eterne militanta”.

Ĉiujn teknikajn ŝarĝojn dum la du lastaj jaroj portas sur siaj ŝultroj la MASlanino el Germanio Julia Mul (Traum). Ŝi prizorgas la EoPK-paĝaron en FB kaj la ĉiumonatan dissendon de la adresoj al la EoPK-membroj, iniciatas vigligon de la agado kaj dissendas salutajn bildkartojn al ĉiuj novaj membroj. Sen la sindona laboremo kaj disciplinemo de Julia la afero nun ne povus ekzisti – kaj ni, la dudeko da sepjaraj ŝatantoj de tiu ĉi agado, multe al ŝi dankas.

Nun nian Poŝtkruciĝon partoprenas pli ol 80 homoj el ĉirkaŭ 25 landoj. Inter ili en tiu ĉi jaro aperis ankaŭ 10-12-jaraj infanoj



el Rusio, kiuj multe ĝojas pro ĉiu bildkartoj kaj – jes – bezonas scii, ke esperantistoj ekzistas ankaŭ en aliaj landoj kaj ke ili estas amikemaj.

Konatiĝu kun EoPK en la paĝaro <https://bildkarto.wixsite.com/bildkarto>, aŭ senprokraste aliĝu ĉe <https://mallonge.net/eopk>. (El *La Ondo de Esperanto* 1/2024, rete: <https://sezonoj.ru/2024/03/masi-35>

Irina Gončarova, kunordiganto de MEA MASI, gvidanto de EoPK

Infana Semajno en Greziljono

14-a Festa semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj kaj geavoj, de la 6-a ĝis 16-a de Aŭgusto 2024, en la franca Esperanto-kastelo Grésillon. Ludoj, banado, manlaboroj, sporto, muziko, kantado kaj E-kursoj. Informoj: <https://gresillon.org/infana>





La aĝo de vario

La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



Sceno 1: Trame al la urbocentro

Rikardo iras per tramo, kiam estis ankoraŭ konduktoroj en tramoj.

Rikardo: Unu bileton por la mezo de la urbo, mi petas.

Konduktoro: Jes, al la mezo de la urbo. Kiomaĝa vi estas?

Rikardo (*kliniĝas suben kaj per alta voĉo*): Dek kvar.

Konduktoro: Ĉu vere?

Rikardo: Morgaŭ estos mia dekkvina naskiĝtago!

Konduktoro: Do, la bileto por infano kostas okdek cendojn.

Rikardo: Sesdek, sepdek, okdek, jen!

Konduktoro: Bone, jen via bileto!

Sceno 2: Antaŭ la kinejo

Rikardo: Unu bileto por la kinejo, mi petas.

Vendistino: Sed la filmo hodiaŭ ne estas por infanoj.

Rikardo: (*Staras alte kaj parolas per basa voĉo*): Sed mi estas viro!

Vendistino: Vi estas tre malalta viro! Kiomaĝa vi estas?

Rikardo: Hieraŭ estis mia dekoka naskiĝtago!

Vendistino: Bone, la kosto de bileto estas kvar dolaroj.

Rikardo: (*turniĝas al la sekva homo*): Ĉu tio ne estas multkosta?

Konduktoro: Ha, la infano en la tramo. Tie, via aĝo estis dekkvar!

Vendistino: Kaj nun en la kinejo, via aĝo estas dek ok.

Konduktoro: Ni tiru lin al la kortumo. La juĝejo decidu pri lia aĝo!

Rikardo: Bonege. Ni faru tion! Superba solvo!

Vendistino: Junulo, ĉu vi ne timas?

Rikardo: Tute ne. La estro de la juĝejo estas mia panjo! Finfine, ŝi scias, kiam mi naskiĝis!

Vortklarigoj: **Konduktoro:** Homo, kiu vendis biletojn kaj prizorgis ordon en busoj kaj tramoj. **Basa:** Malalta. **Kortumo:** Juĝloko. **Superba:** Elstare bona. **Eldonaĵo:** Revuo, gazeto, magazino, libro. **Prezo:** kosto. **Nostalgia:** Karaj pensoj pri pasinta tempo. **Modesta:** Malgrandioza, ne granda. **Katedralo:** Grava preĝejo. **Fatala:** Mortiga. **Skui:** Forte tremigi.

Tiu skeĉo aperis en eldonaĵo de Januaro 1975 en Nov-Zelando. Mi nun ŝanĝas la finon de la rakonto. Evidente, mi devis altigi dekoble ĉiujn prezojn el la versio de 1975. La foto de tramo efektive venas el Nov-Zelando – nostalgia tramo en Christchurch, la plej granda urbo en la suda insulo. Tiu tramo trafikis sur modesta rondira trako urbo-meze, ĉefe por turistoj kaj fervojaj amantoj/frenezuloj kiel mi. La foto montras ĝin antaŭ la kompatinda urba katedralo, kiu perdis sian turon en la fatala tertremo, kiu skuis la urbon.



Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G. P. O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazilia Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrwp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnický@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; *ahto.siimson@esperanto.ee*. **Finnlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Saïd Balouchi, *said.balouchi@esperanto-france.org*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsafia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** József Németh, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *esperoenparmo2020@yahoo.com*. **Japanio:** Japania Esperanto-Instituto, Japania filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Koreio:** 464 Ho, Toegye-ro 217, Jung-gu Seoul, KR-04558, Republic of Korea, Korea Esperanto-Asocio, K-filio de ILEI, *www.esperanto.or.kr*, *kea@saluton.net*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@extra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaïd Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *fidinda@outlook.com*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch_scheidegger@bluewin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.abonoj@gmail.com*.

